HUNGARA VIVO

1
1982
13,– Ft

ĈIU PECO – MARKO!

MAGYAR NÉPMŰVÉSZET EMLÉKBE, AJÁNDÉKBA

80 boltunk kínálja!

servo por klientoj:
184–697

Popolarta kaj Hejmindustria Entrepreno

80 vendejoj ofertas

Hungaraj popolartaĵoj por memoro, por donaco

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest,
Pf. 193. H–1368
Aperas dumonate
XXIIa jaro, 1982 n-ro 1
(101)

ENHAVO

Rados, P.A.: Bonvenon al Budapeŝto 2
Fejes, M.: „Mi esperas, ke la Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj fariĝos tradicio" 4
Kvin demandoj al Lilla Mikes (*M.F.*) 5
Vasiljev, B.: La aŭroroj ĉi tie estas silentaj 7
Fejes, M.: Departemento Baranya 8
Rátkai, Á.: Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado 1. 10
La Programo de Hungara Radio en fremdaj lingvoj 13
Glatz, F.: Historiografo kaj nuntempo 14
Ladányi, M.: Demandoj 15
László, I.: Alfonz Pechan okdekjara 16
Originalaj poemoj de J.I. *Francis*, L. *Gabrielli*, E. *De Kock*, O. *Knichal*, A. de' *Giorgi*, J. *Balbin*, A. *Hules*, I. *Szabó* 16
El „Hungara Antologio" 18
Mihalkov, G.: La harmonia mondo de István Szőnyi 19
Farkas-Tatár, É.: Panoramo 20
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 23
László, F. d-ro: La Internacia Jardeko por Provizado per Trinkakvo 24
Kalocsay-solenaĵoj en Budapeŝto (*P.A.R.*) 31
Rememore pri Hilda Dresen 31
Bálint, Sz.: Ĉiutaga historio 32
Ladányi, M.: Desegnokonkurso 33
Fenyvesi, E.: Gaja paĝo 34
Recenzoj de M. *Fejes*, V. *Benczik*, J. *Varga*, K. *Pov* Krucenigmo 39
Mihalkov, G.: Ekzameno sen risko 39
Leterkesto, Korespondi Deziras 40

Sur la titolpaĝo: Ekspozicio el la verkoj de Kalocsay en la sidejo de Hungara Verkista Asocio. Károly Fajszi, prizorganto de la ekspozicio prezentas ĝin al Sándor Rákos kaj Imre Makai, prezidanto, resp. sekratario de la Tradukista Sekcio de la Verkista Asocio. Foto: Z. *Fejér.*

Esperanta kulturcentro...

estos en Budapeŝto inter 19-28 de marto: dum dek tagoj sur la scenejo de Teatro Radnóti esperantlingvaj spektakloj amuzos la – espereble grandnombran – publikon. Hungarlanda Turisma Oficejo aranĝos Renkontiĝon de Esperantaj Teatroj: tio estos la unua fojo, kiam neesperantista instanco surprenas organizadon kaj financadon de tiel grandskala Esperanta teatra evento. Hungaraj profesiaj geaktoroj prezentos du teatraĵojn, krome estas invititaj Teatro Krizalido el Francio, Pola Esperanto-Teatro, Leningrada Esperanto-Teatro, kaj la aktorino Jadwiga Gibczynska el Pollando; krome okazos ankaŭ literatura podia programo el la verkoj kaj tradukoj de Kálmán Kalocsay. Se la informoj sur la sekvaj paĝoj kaptos vian atenton, ne hezitu skribi al la Turisma Komisiono de HEA, kiu organizas la partoprenon de spektontoj.

En tiu ĉi numero startas serio, kiu celas konigi en formo populara la historion de la internacilingva movado: la aŭtoro kaj la redakcio esperas, ke tiu serio povos signife altigi la historian klerecon de vastaj tavoloj de esperantistoj.

Tuŝas historian temon, kvankam ne Esperantan, la artikolo «Historiografo kaj nuntempo»: la dilemoj, kiujn ĝi lanĉas, certe kaptos la intereson de ĉiuj pensemaj legantoj.

Unuafoje ni publikigas informojn pri la fremdlingvaj programoj de Hungara Radio: estus bone, se multaj aŭskultus tiujn programojn, kaj skribante al la Radio, esprimus sian deziron aŭdi ankaŭ esperantlingvajn elsendojn.

En tiu ĉi numero ni publikigas fragmentojn el «Hungara Antologio», kiu aperos post ĉirkaŭ unu jaro, ĝuste duonjarcenton post la unua tia verko, redaktita de Kalocsay. La ĉi tie aperantaj tradukoj pruvas, ke la nunaj tradukistoj lernis ne malmulte de la forpasinta majstro.

Belaj originalaj poemoj, letero de Hilda Dresen al redakciano de HV, artikolo pri departemento Baranya, pluraj recenzoj kaj la kutimaj rubrikoj kompletigas tiun ĉi 101-an numeron, en kiu, je malaplaŭdo de certe multaj legantoj, ne restis loko por beletra prozo...

Bonvenon al Budapeŝto



Intervjuo kun Márton Lengyel pri la Budapeŝta Printempa Festivalo

Márton Lengyel, la vicgvidanto de la Hungarlanda Fremdultrafika Oficejo kaj komitatano de Hungara Esperanto-Asocio – estas ĉi-jare ĉefa organizanto de la Budapeŝta Printempa Festivalo. Pri tiu evento – inkluzivonta ankaŭ Esperantajn programerojn – li donis intervjuon al nia kunlaboranto.

Kiuj estas la specifaĵoj de la Budapeŝta Printempa Festivalo?

La ĉi-jara Printempa Festivalo estos ne la unua. Tiu okazis pasintjare. Ĝi havis tri unikajn ecojn. La unua: ĝi estis aranĝita kiam en la internacia turismo okazis preskaŭ nenio grava, nome en la lasta dekado de marto. Prave menciis gvidanto de la Aŭstria Fremdultrafika Oficejo, ke la Budapeŝta estas la sola vera printempa festivalo de la mondo. La dua unikeco: la festivalo estas precipe hungara. Al ĝi ni invitas malmultajn eksterlandajn „stelulojn", sed strebas oferti al la gastoj tion, kion la hungara kulturo povas doni. La tria proprajo de nia Festivalo: la ekletikismo konscia. Inter la programeroj troviĝas klasikaĵoj, same kiel pecoj de la tiel nomata „leĝera" aŭ „estrada" ĝenro, ricevas lokon ankaŭ la folkloro, la danco, la baledo, la bildarto, sed ne mankas eĉ la kinarto, kaj, nature, troveblas en la programo eroj specife fremdultrafikaj, kiel ekzemple urborigardadoj, amuzaj vesperoj kun manĝoj hungareskaj ktp. Tiuj ĉi ecoj menciitaj karakterizis la pasintjaran festivalon. Ni ĉi-jare plu fortigos ilin, do la aranĝoj estos tiaj ankaŭ en 1982, inter la 19-a kaj la 28-a de marto.

Parado de husaroj en Buda

Niajn legantojn pleje interesas la Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj.

Ĝi estos io nova ĉi-jare. Ni decidis ĝin okazigi ĝuste tial, ĉar ĝi plene kongruas kun la baza ideo de nia Festivalo. Ĉar ĝi volas kontribui al la principo eldirita de la Tutmonda Turisma Konferenco en Manilo. Nome, ke la turismo ne devas esti nura ekonomia afero, sed ankaŭ fenomeno kultura, politika kaj socia. Ĝi havas gravegan rolon edukan. La Festivalon iniciatis la Hungarlanda Fremdultrafika Oficejo, estos ties propra ido, per kiu ĝi volas doni ekzemplon por nova koncepto pri la fremdultrafiko. Ni volas demonstri: ni ne rigardas la turismon sole monafero...

Sed kiel aliĝas al tio la Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj?

Unue mi parolus pri Esperanto. En Manilo ĝuste la hungara delegitaro iniciatis, ke la konferenco okupiĝu pri la problemo de la Internacia Lingvo. Kaj eĉ naskiĝis rekomendo, kiu mencias la scion de lingvoj, kiel helpilon de la kompreno inter turistoj, loĝantoj de vizitataj landoj kaj laboruloj de la fremdultrafiko. Aparte estas menciita Esperanto, kiel „lingvo kun universala destino." Ni volis montri, ke tio estas ne nur bela ideo, sed praktiko efektivigebla.

Tiel naskiĝis la kunlaboro inter niaj fremdultrafikaj organizaĵoj kaj la hungaraj esperantistoj. La pasintjaran Budapeŝtan Festivalon partoprenis ankaŭ Hungara Esperanto-Asocio. Ĝi havis giĉeton en la ekspozicio „Vojaĝo

'81". La Hungarlanda Fremdultrafika Oficejo eldonis la hungaran varianton de „Baza Esperanto Konversacio Por Turistoj" (BEK), aperis pluraj eldonaĵoj pri Hungario en la Internacia Lingvo, la revuo de la Oficejo „Utazási Magazin" (Vojaĝa Magazino) organizis trimonatan kurson de Esperanto, ni sendis cirkulerojn por laborantoj de la turismo, en kiuj ni proponas al ili lerni Esperanton. La interesiĝo estas vere granda. Ĉi-jare en la kadroj de junulara turisma entrepreno Express eklaboros Esperanto-turisma oficejo. Kaj enkadre de tiu vastskala agado venis la ideo kunvenigi Esperantajn teatrojn, ja tio povas kontribui al la turismo same, kiel al la internacilingva kulturo.

Kion vi mencius el la programeroj de la Festivalo?

Nature, unuavice tion, kion prezentos la hungaraj geaktoroj. Temas pri du teatraĵoj. Unu estas adaptaĵo laŭ la romaneto de Boris Vasiljev: „La aŭroroj ĉi tie estas silentaj", la alia: verko de hungara aŭtoro „Ĉu vi jam vidis la piedsignon de l' Profeto? "

Pri kio la unua temas?

La romano, sur kiu baziĝas la unua prezentado, iĝis jam sufiĉe fama, kelkfoje surscenigita kaj el ĝi oni faris eĉ operon kaj filmon. La historio simplas: kelkaj soldatinoj fariĝas viktimoj de la kruela milito. Postvivas nur serĝento, ilia komandinto. La verko per simplaj, senpatosaj rimedoj rakontas pri la milito, pri la heroeco kaj protestas kontraŭ milito nova.

Kion vi povus diri pri la dua peco?

Prezentado de la „Ĉu vi jam vidis la piedsignon de l' Profeto? " estas aparte interesa por la esperantista publiko. En ĝi temas kaj pri la turismo, kaj pri la komunikada krizo. La teatraĵon, estintan ĝis nun en manuskripto, mi konas jam de kelkaj jaroj. Kiam post la Manila Konferenco mi verkis artikolon pri Esperanto kaj la turismo, mi prenis citaĵon el tiu dramo. La artikolo estis verkita franclingve, la citaĵo el la verko de János Elem estis en la Internacia Lingvo. Tio aperis en la 158-a numero (januaro-februaro de 1981) de „World Travel-Tourisme Mondial".



La internaĵo de Matias-preĝejo

Kio estas la baza ideo de tiu dramo?

La fundamentan penson bone spegulas vortoj de la jam menciita citaĵo „Mi estas turisto. Homo veninta de malproksime, sed kies hejmo estas nun ĉi tie... Nur mi ne scias, kiel ni povus kompreni unu la aliajn, ĉar ni parolas ja malsamajn lingvojn..." Al tio mi aldonus: la turisto de la hodiaŭo similas al la homo de la morgaŭo. Tiu homo de la atendebla futuro malhavos monproblemojn, posedos sufiĉe da libertempo, libere povos elekti el la formoj de aktivado. Povos viziti diversajn landojn, renkonti diversajn homojn. Tiuj maksimume 3-4 semajnoj pasigitaj per turistado en la morgaŭa mondo certe multobliĝos, kaj la nombro de tiuj, kiuj povas partopreni la movadon nomitan „turismo", same iĝos multe pli ol nun. Tion sugestas la tendencoj de la socia progreso.

Kion vi povus diri pri la agado de la „Profeto"?

Turisma oficejo organizas vojaĝon al dezerto, kie tamen troviĝas maksimuma komforto. Sed la turistojn surprizas: la gvidisto scias el ilia idiomo nur kelkajn vortojn, lernitajn helpe de magnetofono. Do ili restas fakte solaj en la centro de dezerto, „kondamnitaj je libero".

Kaj Esperanto?

Ĝi estos la solvo...

Mi petas vin ne daŭrigi, la interesiĝantoj povos spekti la teatraĵon, kaj Hungara Esperanto-Asocio eĉ eldonos ĝin dulingve: hungare kaj Esperante. (Krome aperis el ĝi specimeno en nia antaŭa numero. La Redaktoro.) Kion vi dirus por fini?

Al la Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj HEA organizas spektontojn kaj hungarajn kaj alilandajn. Ili, ĉefe la lastaj, povos ĝui krom la internacilingvaj teatraĵoj, ankaŭ aliajn programerojn de la Budapeŝta Festivalo.

Ekzemple?

Okaze de centjariĝo de Zoltán Kodály, la fama hungara komponisto, muzikisto kaj pedagogo estos prezentata en la Matias-preĝejo de Buda la „Budaburga Te Deum", do en la sama loko kie en 1936 okazis ĝia unua prezentado. Okazos programeroj en Kecskemét, en la fama Kodály-instituto. Krome en la nova Budapeŝta Sportpalaco, kie estas 10 mil sidlokoj. Ĉi tie dancos la fama baled-ensemblo de Győr, okazos vespero de Rock-muziko, ni organizas laŭ la kutimoj de Transilvaniaj (Nord-Rumaniaj) hungaroj „dancejon", kie rolos 30 dancensembloj folkloraj. Krom la spektado la ĉeestontoj povos tie lerni diversajn popoldancojn hungarajn. Oni povos vidi la tri famajn Bartókaĵojn „La kastelo de la blubarba princo", „La mirinda mandareno", „Reĝido skulptita el ligno"; okazos ankaŭ konkurso de vitrin-aranĝistoj, ekspozicioj de Amerigo *Tot* kaj Victor *Vasarely*, tiuj du famaj artistoj vivantaj eksterlande, kaj ankaŭ filmfestivalo, krome ekspozicio „Vojaĝo '82", kie denove estos Esperanto-giĉeto...

Eble tio sufiĉas. Koran dankon pro la intervjuo.

Adiaŭe nur unu vorton mi dirus al la legantoj de HV: „Bonvenon! "

Péter András *Rados*

«Mi esperas, ke la Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj fariĝos tradicio»

Intervjuo kun László Romhányi

Teatra reĝisoro László Romhányi, komisiita arta gvidanto de la ĉijare printempe aranĝota Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj, estas juna kaj laŭ aĝo kaj en la teatra vivo, tamen li estas homo tre okupita. Serĉinte lin krom en lia konstanta laborejo, la Teatro Thália, ankaŭ ĉe tri aliaj teatroj, fine mi sukcesis atingi lin en la kvara teatro. La kurtenoj jam disruliĝis, daŭras la prezentado, ni povas komenci la paroladon.

Kvar diplomoj

Via nomo legeblas sur teatraj afiŝoj kaj en programkajeroj ekde la jaro 1973. Ĉu via vojo estis rekta al teatro?

Mi vivis de mia infanaĝo en ravo de nia beletro, kaj mi pensis ĉiam pri misio, per kio mi povos servi la disvastigon de niaj literaturaj valoroj. Mi akiris diplomon en pedagogia altlernejo pri hungara literaturo kaj historio, poste mi plu lernis en la filologia fakultato de universitato, kaj mi akiris mezlernejan profesoran diplomon pri hungara literaturo.

Tiutempe mi jam sentis, ke la mezlerneja katedro estos por mi malvasta podio, pro tio mi ekstudis ĉe la reĝisora fako de Teatra kaj Filmarta Akademio, kiun mi finis en la jaro 1973.

Finfine vi akiris tri diplomojn, kiuj ĉiuj staras en servo de hungara literaturo. Ĉu per tio finiĝis viaj studoj?

Tute ne; tiuj diplomoj donis al mi nur rajtigilon por agi en la intereso de la elektita celo, sed multe mi lernis dum laboro, kaj mi plej fieras pri mia kvara diplomo, kiun mi ricevis de *Djemiŝčev*, ministro pri kulturo de Soveta Unio, en Kievo, antaŭ du jaroj okaze de la 11-a Festivalo de Hungara Dramo, kie mi sukcese reĝisoris la dramon de Örkény: „La familio Tôt".

La unua provo de „Ĉu vi jam vidis la piedsignon de l' Profeto?" **(Fotoj: Jakab Regös)**



«Sange serioza afero»

Krom via konstanta teatro vi reĝisoris multloke, kunlaboris kun multaj trupoj interalie ankaŭ en Soveta Unio. Ĉu vi renkontis dum viaj studoj aŭ laboro imitindan modelon, idealon, kies priartajn konceptojn vi povas akcepti kaj sekvi?

Jes, kaj ĝuste en Soveta Unio, en Leningrado. Tovstonogov, arta gvidanto de Akademia Teatro estas tiu teatra fakulo, kies laboron mi povis studi en la jaroj 1973-74, kaj kiu estas modelo por mi. Kaj persone, kaj teorie li estas mia modelo, liaj priartaj konceptoj staras la plej proksime al mi.

Kiel vi resumas viajn konceptojn pri teatro?

Per vortoj de verkisto András Sütő: „Ekzistas homaj deziroj, klopodoj, kiujn oni devas akcepti kiel sange seriozajn." – Por mi teatro estas tia.

Lastatempe vi reĝisoris dramojn de Hochhuth: „La Juristoj", dramon de Ferenc Karinthy: „Dominaŭguro", ankaŭ kabaredon... Ĉu vi preferas modernajn aŭtorojn?

Reĝisori dramojn de hungaraj klasikuloj estas por mi malofte okazanta ĝojo, sed tio estas mia revo. Tre volonte mi surscenigus ekzemple la mezepokan dramon de Bornemisza: „Hungara Elektra", sed la nuntempa moderna hungara dramo – . estas laŭ mi pli grava. Koncerne klasikulojn de mondliteraturo, mi ankoraŭ ne sentas min preta, mi devas ankoraŭ kolektadi fortojn kaj spertojn.

Monda kulturo – monda lingvo

Viaj eksterlandaj studoj kaj sukcesoj konjektigas, ke vi estas hejme ankaŭ sur fremdlandaj podioj. Ĉu vi parolas plurajn lingvojn?

Nun vi kaptis min. Fakte mi nur revas pri perfekta lingvoscio. Mi parolas la rusan, eble pli bone la anglan, tamen mi sentas ĉi-terene intelektan skizofrenion: mi volus disvastigi hungaran dramliteraturon kaj akcepti tiun de la tuta mondo, sed la diverslingveco kvazaŭ malhelpas tion.

Kaj ĉu Esperanto povas helpi ĉi-terene? Kial vi akceptis la komision esti arta gvidanto kaj reĝisoro de esperantlingvaj prezentadoj?

Mi sentas bezonon de internacia lingvo; por fariĝi mondcivitanoj, nepre ni bezonas ĝin. Esperanto bone servas interŝanĝon de diversaj kulturoj, ĝi estas bona peranta lingvo.

Okaze de la Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj vi reĝisoros dramon de János Elem: „Ĉu vi jam vidis la piedsignon de l' Profeto?" Kial estis elektita ĝuste tiu ĉi dramo, ankoraŭ hungarlingve ne prezentita?

Tiu ĉi dramo estas verko porokaza, tamen ĝi tre multe diras al ni, ĝi estas respondo por la spektikuloj de nia epoko. La aŭtoro kun forta kredo kredas kaj trudas al ni sian universalan humanismon, eldiras kaj postulas respondecon kaj mision de la esperantistoj de la mondo. Li sprite kaj ironie nin liberigas de niaj superfluaj ŝarĝoj, t.e. de niaj egoismaj ecoj, angoroj, malgrandanimeco. Ekde Rousseau estas moda afero mediti pri filozofia koncepto: „reen al naturo", kaj tiu ĉi demando hodiaŭ, en epoko, kiam turismo fariĝas ĉiam pli tutmonda evento – postulas respondon en la intereso de ĉiu unuopa vivo.

Kion vi atendas de tiu ĉi Teatra Renkontiĝo?

Mi ne atendas unuavice *fakajn* sukcesojn, sed mi opinias, ke la renkontiĝo estos tamen ekzameno. Ni devas akceptigi al publiko *ekziston* de Esperanta Teatro, ĉar nur tio certigus, ke el tiu porokaza aranĝaĵo fariĝu tradicio, ĉiujara aranĝaĵo.

Aliflanke ĝi estos ekzameno ankaŭ por esperantistoj: kiagrade ili povos subteni la festivalon, la esperantista publiko devos demonstri, ke estas inde ludi por ĝi. Temas pri reciprokeco, kaj per la eventuala sukceso povos gajni kaj la tutmonda kulturo, kaj la esperantistaro.

Ni opinias same, kaj fidas pri la artamo de la esperantistoj.

Márton *Fejes*

Kvin demandoj al Lilla Mikes

Lilla Mikes, Jászai-premiita aktorino de la Teatro Radnóti ankaŭ partoprenos Renkontiĝon de Esperantaj Teatroj en Budapeŝto. En Budaburgo, sur la kafeja podio Korona, kie ŝi jam akiris multajn sukcesojn per siaj hungarlingvaj kaj ankaŭ fremdlingvaj literaturaj vesperoj, ŝi prezentos esperantlingvan programon omaĝe al Kalocsay.

Krom en la hungara lingvo vi prezentas literaturajn programojn ankaŭ en la lingvoj angla, franca, germana kaj rusa. Kiaj motivoj vin instigis fari tion?

La ideo venis dum mia Usona turneo. Tie mi spertis, ke la dua kaj tria generacioj, idoj de iamaj hungaraj elmigrintoj jam ne sufiĉe konas nuancojn de la hungara literatura lingvo. Kaj se mi por ili faros prezentadon en angla aŭ en franca lingvoj, tion povos ĝui ankaŭ ĉeestantaj Usonanoj kaj Kanadanoj – do la disradiado estos pli efika.

De tio ĝis Esperanto estas nur unu paŝo. Kiel okazis tiu paŝo?

Laŭ la peto de HEA mi kontribuis al la Hungara Kulturfestivalo en 1972, kaj mi faris literaturajn programojn poste en provinco, ankaŭ eksterlande.

Ĉu donis al vi ian novaĵon tiuj esperantlingvaj programoj?

Jes, kaj mi dankas la sorton, ke mi sukcesis konkeri tiel karan publikon, kiel tiu de esperantistoj. Mi sentas, ke esperantistoj staras pli proksime al mi ol alia fremdlingva aŭskultantaro, mi sentas, ke esperantistoj akceptis kaj ekamis min, kaj tio estas reciproka.

Jam forpasis kelkaj jaroj depost mia Bulgaria turneo, kie mi prezentis klasikan kaj modernan hungaran beletron en Esperanto, sed de tiam konstante mi ricevas de bulgaraj esperantistoj – ankaŭ de estroj de BEA – diversajn memoraĵojn, eldonaĵojn, kiuj min instigas plu okupiĝi pri Esperanto.

Vi jam prezentis Kalocsay-vesperon en Budapeŝto. Ĉu okaze de tiu ĉi prezentado vi modifos vian programon?

Jes, mi kompletigos ĝin, parte el la ĵus ricevita *Tutmonda Sonoro*, parte el tradukoj aperintaj en HV. Mi kompilos programon ne ekskluzive el la verkaro de Kalocsay, sed mi utiligos ankaŭ pli novajn tradukojn el la hungara beletro, kiuj ja ankaŭ surhavas la stampon de lia arto.

Iam vi ofte faris prezentadojn kun muzika akompano far nia samideano Imre Ungár, Kossuth-premiista fortepianisto. Li jam bedaŭrinde ne vivas. Kiuj estos viaj nunaj kunlaborantoj?

Geaktoroj: Zoltán *Gera*, József *P. Kovács*, Anna *Kiss*, Andrea *Zsadon*, operkantisto Balázs *Póka* kaj fortepianisto Ferenc *Oláh*.

Dankon pro la respondoj – kaj multajn sukcesojn!

M.F.

malpliigas
elfalon,
stimulas
kreskadon
de haroj
HERBÁRIA
Országos
Gyógynövényforgalmi
Közös Vállalat
Bánfi
HAJSZES
Bánfi
HAJSZESZ
LIKVAJO
BÁNFI

Boris Vasiljev

La aŭroroj ĉi tie estas silentaj

per kiu hungaraj geaktoroj inaŭguros la Renkontiĝon de Esperantaj Teatroj. Nun ni prezentas ĉerpaĵon el la fame konata verko de Boris Vasiljev: „La aŭroroj ĉi tie estas silentaj", kiu antaŭ kelkaj jaroj rikoltis grandan sukceson ĉe la hungara publiko. La rolon de ĉefserĝento Vaskov ludis Zoltán Gera, renoma hungara aktoro – ankaŭ esperantisto – kiu verŝajne konkeros per sia talento ankaŭ la koron de la esperantista publiko.

Por tiuj, kiuj ne konas la dramon, kelkvorte pri ĝia agado: dum la dua mondmilito malgranda grupeto de sovetaj soldatinoj, sub komando de ĉefserĝento Vaskov, kunpuŝiĝas kun trioble pli granda germana esplorista grupo. La soldatinoj provas per diversaj artifikoj eviti la batalon kun la pli forta malamiko, sed fine unu post la alia ili ĉiuj viktimiĝas. En la ĉi-suba fragmento ili ankoraŭ sukcesas mistifiki la malamikon.

SCENO 27

VASKOV – (*rampante disdonas panon kaj lardon al la knabinoj*) La situacio estas la jena: unue – dek ses homoj kun mitraletoj estas grava superforto. Ni ne povas venki ĝin. Tio estas certa. Due – Briĉkinan mi reirigis, por ke ŝi alportu helpon. Trie – antaŭ noktomezo ni ne povos kalkuli pri la helpo. Kvare – ni devos eviti batalon. Kvine – se tamen ni batalos, ĝis noktomezo ni ne povos elteni.

RITA – Kaj se ni kaŝos nin silente, dum ili preterpasos nin?

VASKOV – Ni ne povas tralasi ilin tra la montetoj. Ni devas devojigi ilin. Sed kiel? Tiel, ke ni supozigos al ili, ke necesas singardo, ĉi tie tendumas soldata trupo! ... Tiam... Sed kiun mi povos montri al ili el tiu ĉi „soldata trupo"? Min mem... kaj... vin... kaj tiam? Ili esploros, kaj konstatos, ke tiu „soldata trupo" estas nur ni... Kaj kio okazos? ... Ili ĉirkaŭos nin, kaj sen pafo, per kvin tranĉiloj... kaj fino... Tio estas la situacio... (*komencas razi sin*) Knabinetoj, nia afero staras malbone...

RITA – Kamarado ĉefserĝento! Kio okazus, se ili renkontus ne soldatan trupon...

VASKOV – Sed?

RITA – Arbhakistojn.

VASKOV – Kiajn arbhakistojn? Estas milito!

RITA – Sed arbhakistoj ankaŭ tiam vivas en la arbaro. Se la germanoj vidus tian arbhakistan brigadon, ĉu ili postirus ĝin?

GALJA – Tute ne! Neniel ili postirus ĝin!

ĴENJA – Kompreneble. Ili ne povas scii, kiom da brigadoj laboras ankoraŭ en la arbaro!

SONJA – Tiam do! Ni estos la arbhakistoj!

VASKOV – (*gaje rigardas ilin*) Jen tio! Nu, knabinetoj! Vi estas saĝaj knabinetoj! ... Kaj bonaj soldatoj! ... (*la knabinoj fiere aŭskultas lin*) Do. La plano estas la sekva: oni formetu ĉion, kio rilatas soldatecon! Ĉetvertak kaj Gurviĉ meze bruligu bivakfajron, kaj faru kiel eble plej grandan bruon! Osjanina, vi kriadu dekstre, mi kun Komelkova maldekstre. Ĉar tie estas pli facile trairi. Kaj se la Fritz-oj tamen provus trairi, mi mortigos unu-du el ili por ke vi havu tempon fuĝi.

SONJA – Ili venas!

VASKOV – Bone. Ĉiu al sia loko! Ek, la bruo! (*la knabinoj kun granda bruo frapadas, „hakas" la arbojn, kriadas, imitas bruon de segilo, poste abrupte ĉio silentiĝas*)

ĴENJA – (*mallaŭte*) Eble ili foriris?

VASKOV – Mi ne vidas... Atendu! ... Mi vidas! Ili venas! Du! Ili esploras! (*aperas du germanoj, ili*

En la pasinta numero ni publikigis fragmenton el la teatraĵo „Ĉu vi jam vidis la piedsignon de l' Profeto?"

proksimiĝas) Fino! (*prenas sian pistolon*) Ĵenja! Kuru kun la knabinoj! Fuĝu!

ĴENJA – (*kolere*) Ĉu fuĝi? (*rapidmove deprenas siajn kamizolon kaj jupon*)

VASKOV – Haltu!

ĴENJA – (*ŝovas sin flanken*) Raja, Vera venu bani vin! (*kuras al la germanoj, kiuj flankeniĝas. Ĵenja malligas siajn harojn, kantas, kaj retrokrias*) Venu jam! Knabinoj! Voku ankaŭ Ivanon! (*denove aperas la germanoj. Ĵenja formetas plian veston. Kantante, „senzorge" ŝi proksimiĝas al la akvo*) Vanjuŝka! Venu jam! (*la germanoj denove flankeniĝas*)

VASKOV – Haho! Mi venas! Ni venas jam! (*aperas duone vestite*) Ĉu vi? Vestu vin rapide! Oni telefonis el la centro. Tuj venos la veturilo! (*la germanoj denove aperas*)

ĴENJA – (*koketeme, gaje etendante la brakojn al la suno, kantante*)

VASKOV – Venu jam! (*tiras ŝin, flustrante*) Mi petegas vin, Ĵenja! Fuĝu! (*laŭte*) Vestu vin, maldeca virino! Venos la veturilo, kaj ĉiuj vin gapos!

ĴENJA – (*koketeme ludas, ekkuras*)

VASKOV – (*prenas la vestojn de Ĵenja, kaj same ekkuras*) Atingu min, se vi povas! (*kuras, Ĵenja post li*) Vestu vin! Sufiĉe ni riskis jam!

SONJA – (*rigardas per binoklo*) Ili foriris...

RITA – (*raŭke*) Foriris...

GALJA – Ho, Ĵenja! Vi estis ege bravega! ... Ĉu ne?

VASKOV – Tio finiĝis... knabinetoj! Kaj niaj ebloj... Fino... Escepte, se Briĉkina revenos frue.

RITA – (*raŭke*) Ŝi revenos... (*ĉiuj enpensiĝante rigardas antaŭ sin*) Ŝi devos reveni...

VASKOV – Tiam do! Ni trinku, knabinetoj! Je la rapidaj kruroj de Liza! Kaj je viaj saĝaj kapetoj.

Tradukis: V. *Benczik*

Regionoj de Hungario

Departemento Baranya



Montaro Mecsek kaj ĝia regiono

Por eksterlandanoj, eĉ ofte por hungaroj – ne sufiĉe konantaj historiajn kialon kaj kielon pri elformiĝo de nuna ŝtatadministrada divido de Hungario – limoj de unu aŭ de alia departemento ŝajnas arbitraj kreitaĵoj. Escepton ni trovas nur ĉe kelkaj regionoj, inter kiuj okulon frapas la natura unueco de Baranya.

Fakte, tiu ĉi departemento – situanta en la plej suda parto de Transdanubio (ankaŭ de Hungario) – estas per karakterizaj trajtoj distingigebla regiono. Ĝi el ĉiu direkto havas limojn naturajn: oriente limas ĝin la insulo de Mohács inter du branĉoj de Danubo; de sudo la Jugoslavia landlimo preskaŭ identa kun la fluo de rivero Drava; norde la valo ĉe Mecsek-piedoj, okcidente la mildaj deklivoj de montetoj Zselic en la najbara departemento Somogy.

Sur tiu teritorio – tute identa kun la regiono de montaro Mecsek – ampleksanta 4500 km^2-ojn, vivas ĉ. 400 000 homoj.

La regiono, havanta pli mildan ol la tutlanda, kvazaŭ mediteranean klimaton kaj konvenan al tio flaŭron kaj faŭnon, ankaŭ pro siaj historio, etnografiaj, ekonomiaj kaj kulturaj valoroj sendube estas unu el la plej vizitindaj partoj de Hungario.

Spinon de la regiono formas la montaro Mecsek, okupanta la mezon kaj la nord-orientan parton. Ĝiaj plej altaj suproj estas: okcidente Tubes (612 m); meze Misina (ĉe Pécs, 534 m); oriente Zengő (682 m).

De paleolitiko ĝis atom-epoko

Engrotaj trovitaĵoj atestas pri tio, ke en tiu ĉi montara regiono vivis homoj jam antaŭ 80 000 jaroj, tamen pli multaj kaj identigeblaj estas tiaj restaĵoj el neolitiko. En la epoko de popolmigrado nomadaj triboj invadis la regionon, ilin sekvis iliroj, keltoj, romianoj. Ekde la romiana epoko ni povas paroli pri elformiĝo de urba civilizo – el tiu tempo datiĝas la 2000-jara pasinteco de la urbo Pécs, centro de la regiono, kiu sub nomo Sopianae estis ĉefurbo de orienta parto de romia provinco Pannonia.

La urbo, kiu pli ol kvar jarcentojn estis sub romiana regado, estis vigla ankaŭ ĉe la agonio de Romia Imperio, dum la apero de kristanismo: pluraj prakistanaj temploj kaj konstruaĵoj restis el tiu epoko, eĉ subtemplo de la katedralo konstruiĝis sur fundoj romianaj. (Verŝajne tiuj prakistanaj temploj havigis al la urbo alian nomon: Quinque Ecclesiae, kiu aperis poste en germana formo kiel Fünfkirchen).

La romianojn intertempe forigis la popolmigrado, kaj fine la regiono estis okupita far hungaroj en 899. Cent jarojn post la patrujokupo la unua hungara reĝo, Stefano la Unua fondis abatejon en Pécsvárad kaj episkopejon en Pécs, kiu urbo baldaŭ fariĝis kulturcentro de eklezia karaktero, samtempe ĉirkaŭe elformiĝis sistemo de fortikaĵaj bienoj.

En 1367 urbo Pécs jam havis universitaton kun rajto „Studium generale". Poste la humanisma episkopo-poeto Janus Pannonius levis la urbon al alta nivelo.

Pro la turka okupado la regiono suferis tre multe. Ĉi tie, ĉe la kampo de Mohács la hungaroj travivis la plej gravan malvenkon: en la jaro 1526 la turkoj neniigis la hungaran armeon. Kontraŭstaris fortikaĵo de Szigetvár, ĝi iĝis glora historia simbolo de heroa sinofero. Dum la turka regado la loĝantaro grave malpliiĝis, pluraj vilaĝoj eĉ malaperis. Tamen la okupantoj registris altan nivelon de evoluo. Evlia Ĉelebi, turka vojaĝanto kaj historiisto skribis en la 16-a jarcento: „Pécs estas la plej bela turka komercurbo... Ĝi estas vera tera paradizo."

Post la foriro de turkoj la Habsburga regado refondis fundamentojn de feŭdisma ŝtato, en kiu tamen pli grandan rolon havis la elformiĝintaj manufakturoj kaj riĉo de naturo: la karbo de montaro Mecsek. Tiu erco donis bazon por la kapitalisma evoluo, ĝia liverado evoluigis la trafikon, kaj reciproke: evoluo de la trafiko kontribuis al fondo de pli novaj fabrikoj, entreprenoj. Fine de la 19-a kaj komence de 20-a jarcentoj estis fonditaj fabrikoj de ĉampano, orgenoj, gantoj, ledoprilaboro, biero, brikoj kaj porcelanfabrikoj, inter kiuj pluraj akiris tutmondan famon kaj ĝuas tion eĉ nuntempe.

La mondmilitoj kvankam ne pretiriris, tamen indulgis la regionon. Post la liberiĝo de la lando ekis nova progreso. Krom la jam konataj karbtrovejoj, en 1950 estis malfermita karbminejo en vilaĝo Komló, kiu dank' al tio baldaŭ fariĝis urbo. Ekfloris nova branĉo de mineksploato: en 1955 estis malfermita uranminejo, kiu amase logis ĉi tien novajn laboristojn; ĉirkaŭ la historia urbocentro naskiĝis modernaj loĝkolonioj.

Ne estas hazarde, ke la regiono estas nomata pri la montaro, ĉar en ĉiu epoko ties natura riĉeco garantiis la

Sikonda





Katedralo de Pécs **Fotoj: Z. Fejér**

vivkondiĉojn por la loĝantaro. En pratempoj la vivo komenciĝis en prahomaj grotoj; nuntempe kaj ankoraŭ por-longe la ercoj, sin kaŝantaj en sino de la montaro garantias evoluon kaj perspektivon de la tuta provinco.

La centro...

La administrada centro de la regiono, Pécs, en ĉiu epoko estis ankaŭ kultura centro. Nuntempe krom du universitatoj (medicina kaj jura) ĝi havas altlernejojn pedagogian kaj teknikan, dekon da mezlernejoj, inkluzive ankaŭ belartan kaj muzikan faklernejojn kaj bazlernejojn ankaŭ por la ĉi tie loĝantaj naciaj minoritatoj, t.e. por sudslavoj kaj germanoj. Por ili regule dissendas nacilingvajn programojn ankaŭ la radia kaj televida stacioj, funkciantaj en la urbo.

Krom riĉaj bibliotekoj kaj muzeoj (historia, etnografia, arkeologia ktp.) pluraj galerioj atendas la interesiĝantojn. Inter tiuj plej famaj estas la Muzeo Zsolnay (kun keramikaĵoj de porcelanfabriko), galerio de Csontváry kaj Vasarely. Ankaŭ surstrate abundas arkitekturaj kaj belartaj kreaĵoj, skulptaĵoj ktp.

Restaĵoj de la turka okupado nun estas fieraĵoj de enloĝantoj: du moskeoj – unu kun minareto – nedisigeble apartenas al la panoramo de l' urbo.

Nature, la muzoj ne evitis tiun ĉi belan regionon: krom teatro funkcias ankaŭ koncertejo; la dancensemblo Mecsek, la baletensemblo kaj la pupteatro Bóbita akiris famon al la urbo ankaŭ eksterlande.

Estas vigla ankaŭ la sporta vivo, pluraj lokaj sportsocietoj donis eminentulojn al la hungara sporto; en la departemento funkscias eĉ du futbal-teamoj de la unua ligo.

Dum jarcentoj simbolo de la urbo estis la kvartura katedralo, respektive karakterizaj duongloboj de la turkaj moskeoj. Lastatempe sanĝiĝas ankaŭ la panoramo de l' urbo: la nova televida turo heroldas jam ne pri la pasinto, sed pri alta nivelo de tekniko kaj kulturo de la nuntempo. La zoologia parko, situanta ĉe la piedoj de la monto, apartenas al la pli novaj kreaĵoj, ĝi konstruiĝis parte far oferemaj volontuloj.

Kaj la regiono...

La naturo rimarkeble favoris ĉi tiun regionon, donis al ĝi sufiĉe da belo kaj bono; tamen ĝi forgesis pri io: la regiono havas malmulte da natura akvo, t.e. lagojn kaj riverojn. Tamen tiu ĉi manko estas jam nerimarkebla: pluraj artefaritaj lagoj servas la fiŝproduktadon, ripozon, surakvajn sportojn.

20 km-ojn de Pécs, en la koro de montaro Mecsek ĉe vilaĝoj Abaliget kaj Orfű nuntempe elformiĝas unu el la plej belaj ripozejoj de lando. La nomo Abaliget sonas jam konata por esperantistoj: ĝi estas loko de la aranĝaĵo IREN. Ĉi tie du artefaritaj lagoj – unu por plaĝo, unu por boatado – en pitoreska valo, stalaktitgroto en la montaro – ĉiam donis refreŝiĝon al la partoprenantoj. La artefaritajn lagojn de Orfű preferas fiŝkaptistoj.

Vojaĝante norden baldaŭ ni atingas la urbon Komló, kiu en la lastaj jardekoj fariĝis vera minista urbo el la iama vilaĝo. Administracie al ĝi apartenas la ripozejo-banloko Sikonda, kies akvo havas terapian efikon kaj servas por kuracado kaj refreŝiĝo de la tie loĝantaj ministoj.

Ĉe la piedoj de Zengő, plej supra altaĵo de la montaro situas vilaĝo Pécsvárad, kies fortikaĵo – konstruita en la mezepoko – jam de malproksimo alvokas la atenton. Ĉirkaŭ la vilaĝo, grandegaj maronarbaroj troviĝas, en kiuj ne maloftas arboj eĉ okcentjaraj.

Veturante al sudorienta direkto, sur la dekstra bordo de Danubo ni trovas urbon Mohács, al kiu apartenas ankaŭ insulo. En 1526 la turka armeo sub estrado de sultano Sulejmano kun 70 000 soldatoj ĉi tie venkis la hungaran armeon, kiu plene neniiĝis. Proksime al la urbo, sur loko de iama batalkampo estis aranĝita tombejo de la mortintaj herooj. Tiu ĉi tombejo kun artaj lignaj skulptaĵoj estas ankaŭ belarta kaj historia vidindaĵo. Alia specialaĵo de la urbo estas la buŝoo-iradoj, karnavalaj maskeradoj de la tie loĝantaj sudslavoj (vd. la kovrilfoton de HV 6/1977).

Plu veturante al sudo ni denove atingus montaron: tiun de Villány. Tiu ĉi montaro famiĝis unuavice kiel vinregiono, sed la mont-areno havas ankaŭ industriajn valoraĵojn: tie oni ekspluatas marnon, krudmaterion liverotan por la cement-, kaj kalkfabriko de Beremend, kiu vilaĝo situas ĉe la suda ekstremo de la departemento.

Varmakva kuracbanejo de Harkány, kaj ties hospitalo servas por kuracado de reŭmatismaj malsanoj. En la najbara vilaĝo Siklós staras fortikaĵo, kiu ekde sia konstruo en la mezepoko estas konstante loĝata. Ĝi funkcias nun kiel turisthotelo.

Proksime al Siklós situas vilaĝo Máriagyüd, kies baroka preĝejo, aparteninta al franciskanoj estas eĉ nuntempe vizitata pilgrimejo de katolikoj.

Urbo Szigetvár kun sia fortikaĵo, muzeo, turisthotelo estas ankaŭ nepre vizitenda en tiu ĉi regiono.

Esperantistoj en la departemento estis kaj estas ĉiam bonvenigataj. La tie funkcianta Departementa Komitato de HEA ne forgesis pri la vizitontoj: kaj ĉe fremdultrafikaj instancoj, kaj rekte ĉe vidindaĵoj oni trovas ankaŭ esperantlingvajn surskribojn. Esperantistoj de la regiono estas dommastroj de ĉiujara IREN-aranĝaĵo, ili iniciatis ankaŭ Pioniran Esperanto Tendumadon, eĉ, en 1966 ĉi tie estis kongreso de TEJO. En la urba Pionira Domo funkcias ankaŭ Esperanto-fakrondo – tio garantias prosperon ankaŭ en la futuro.

Márton *Fejes*

Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado

D-ro Árpád Rátkai

La teorio kaj la teoriulo

Lingvo estas karakterize homa kreitaĵo, eĉ unu el la plej homaj. Tamen la homaro tute *spontane,* kvazaŭ senintence generis la etnajn lingvojn. Jen interesa paradokso, kiu en la lastaj jarcentoj kvazaŭ provokis homojn *konscie krei lingvon.* La problemo havas abundan literaturon, aperis plurcent lingvoplanoj, plejparte dum la lastaj du jarcentoj. La lingvistiko pli kaj pli intense esploras ilin (interlingvistiko), sed preskaŭ komplete mankas la sociologiaj kaj historiaj esploroj tiukampe.

Sekve ni malmulte scias pri tio, kial la aŭtoroj kreis tiujn lingvoplanojn, kial ili kun siaj adeptoj klopodis lingvigi ilin, kian socian rolon ili celis por tiu lingvo, kia lingvouzo estis ilia celo. Strange, eĉ la aŭtoroj ne ĉiam klarigis la celojn de siaj fortostreĉoj.

Por orientiĝi inter la multaj teorioj, planoj kaj klopodoj ni devas klare vidi, ke la celoj fundamente diferencis. Distingendas la jenaj tri fundamentoj:

1/ filozofia Universala Lingvo
2/ utopiista Universala Lingvo
3/ la Internacia Lingvo

La tri tendencoj

De la 11. ĝis la 19.. jc. regis la tendenco de la *filozofia Universala Lingvo.* Tiu ideala lingvo la plej konforme respegulus la realon. Ĝian problemon oni rigardis lingvofilozofia problemo, sekve esploris ĝin ankaŭ elstaraj filozofoj, ekz. Descartes kaj Leibniz. La aŭtoroj de la konkretaj lingvoplanoj tute ne aŭ apenaŭ pensis pri la praktika aplikado de ilia «perfekta» lingvo, por ili ekzistis nur la teoria problemo. Sekve la lingvoplanoj estis preskaŭ senescepte pazigrafioj (sistemo de universala skribo, kies signoj esprimas rekte ideojn kaj ne vortojn) kaj aprioraj (bazita sur teorio, ignoranta praktikon) lingvoplanoj.

Descartes

Novmaniere aperis la problemo en la verkaro de la utopiistaj socialistoj, ekz. Cabet, Fourier kaj Weitling. La lingva unueciĝo de la homaro estas ĉe ili nur akcesoraĵo, sed memkomprenebla akcesoraĵo de la granda socia transformiĝo, socia unuiĝo. La *utopiista Universala Lingvo* estus la sola lingvo de la ankaŭ lingve unueca homaro, post la epoko de la nacioj kaj la naciaj lingvoj. Lanti kaj liaj adeptoj, la sennaciistoj estis la lastaj «revarmigantoj» de tiu utopiista ideo, en la 20-aj jaroj de nia jc.

La uzado de la naciaj lingvoj en la internacia komunikado spontane kreskis kaj komplikiĝis. Tiun sistemon de la lingvouzado la socio kreis, sed ĝi ne plu regas sian kreaĵon, nur adaptiĝas al ĝi. Tiu uzado de naciaj lingvoj en la internacia komunikado fariĝis ekonomia ŝarĝo, kreskanta problemo de la lingva edukado ktp. Tiuj simptomoj de la fremdiĝo

vekis malkontenton kaj stimulis la formiĝon de la koncepto pri *la Internacia Lingvo.*

La epiteto «internacia» signifas la socian funkcion de la lingvo: ĝi estas aplikata ne anstataŭ, sed apud la naciaj lingvoj, *en la internacia komunikado, kaj nur tie.* La ĝenerala uzado de tiu lingvo estus grava ekonomia gajno por la socio, ja ĝi estas la plej ekonomie ellernebla, alproprigebla fremda lingvo por la tuta homaro.

Oni distingu inter «uzi» kaj «apliki». Uzi: preni ion kiel rimedon, instrumenton, por atingi celon. Apliki: uzi ion laŭ ĝia destino.

La pioniroj de la internacilingva teorio estis la ĉeha Komenskỳ kaj la juda Zamenhof. Multaj lingvoplanoj konkuris por konkeri la pozicion de la Internacia Lingvo – preskaŭ ĉiam *aposterioraj* (bazita sur spertoj kaj faktoj) – sed definitive nur unu lingviĝis el ili, tiu de Zamenhof. La internacilingva movado kiel lingva komunumo lingvigis tiun planon, kaj ĝi iĝis kreinto, socia bazo, socia portanto de la Internacia Lingvo. La historio de tiu movado esta nia temo.

Sed kial tiel *majuskle, en sia ekskluziveco: la Internacia Lingvo?* Ĉar ĝi estas konscia homa kreaĵo, unusola. Erare oni nomas «internaciaj lingvoj» la ankaŭ internacie uzatajn naciajn lingvojn, la artefaritajn lingvojn por specialaj celoj (ekz. kibernetikajn) kaj la lingvoplanojn, ignorante tion, ĉu ili celis fariĝi Universala Lingvo, Internacia Lingvo, «regiona internacia» lingvo, aŭ io alia. La kutima ignorado de iliaj sociaj fono, celo kaj rolo ofte kaj nepre kondukas al spekulativa, falsa taksado, aprecado.

Prapatro de la internacilingva ideo

Jan Amos Komenský (Nivnice 1592-03-28 – Amsterdam 1670-11-15) ĉeha filozofo, fondinto de la scienca pedagogio, eminenta praktikanta pedagogo kaj la ĉefa reprezentanto de la ĉeha kulturo en la 17a jc., eminenta scienculo de la ĉeha lingvo prilaboris teorian bazon de la definitiva solvo de la internacia lingva komunikado. Liaj patriotismo, demokratismo kaj profunda humanismo, kiuj manifestiĝis konekse kun liaj porpacaj klopodoj, kondukis lin al tiu solvo.

En sia latinlingva *Via lucis...* (verkita en la jaroj 1641-42 en Britio) kaj poste en aliaj verkoj li prilaboris la teorion de la Internacia Lingvo. En *Via lucis...* kiu aperis nur en 1668 en Roterdamo, estis formulitaj la jenaj principoj pri tiu lingvo:

1. Ĝi estos «la sola lingvo komuna por ĉiuj nacioj«.

2. «Ĉiuj nacioj konservu kaj kulturu, ankaŭ sian propran lingvon», kaj ankaŭ la lerneja edukado okazu en ili.

3. Tiu lingvo devas esti preciza, fleksema, riĉa en nuancoj kaj belsona, «taŭga el ĉiu vidpunkto». Ĝi devas esti tiel facile instruebla, ke ĉiu kapablu alproprigi ĝin, multe pli facile instruebla, ol la naciaj lingvoj, sekve ĝia instruado rezultigu ŝparadon de tempo kaj energio. Por neniu nacio ĝi povas esti malsimpatia, kaj por ĉiu nacio ĝi devas esti egale utila.

4. La ĝenerala aplikado de tiu lingvo ne tute eliminas la bezonon de scio de aliaj lingvoj por scienculoj.

Komenský konis la teorion de la filozofia Universala Lingvo kaj impresis lin ĝia ĉefa principo pri la «perfekteco». Li tamen starigis tute novajn principojn, kaj la «perfekteco» fariĝis nur malgranda parteto de la nova teorio. Ankaŭ tiun fakton ni ne mistaksu, ke li skribis ĉiam pri Universala Lingvo, – ja la vorto «internacia» en la 17.jc. ankoraŭ en neniu lingvo ekzistis.

La geniaj pensoj de Komenský longe forgesiĝis, kune kun la restinta ekzemplero de lia libro. Nur en nia jarcento oni malkovris tiun forgesitan libron, kaj aperis novaj eldonoj (ĉeĥe 1920, angle 1938), fine la aŭtentika fonteldono kun ĉeha traduko en 1961.

La saman teorion rekreis Zamenhof en 1887, kaj la tiutempa socio jam ne restis indiferenta je ĝi.

La Porinstruista Altlernejo „Comenius" en Sárospatak

ORION TV RADIO

COLORION-ELECTRONIC



CT 656

- Aŭtomata ŝaltilaro per-tuŝa
- Taŭga por programi ok staciojn
- 56 cm-a, 110°-a en-linia ekrantubo
- Aŭtomate ŝaltebla por akcepti sendaĵon ĉu laŭ PAL, ĉu laŭ SECAM
- Ŝtopilingoj por aŭskultilo kaj por magnetofon-aparato

nova

56 cm

M MODUL SYSTEM

130 VATO

La Programoj de Hungara Radio en fremdaj lingvoj

1981.11.01. – 1982.05.01.

Indikoj laŭ la sistemo de Greenwich (GMT). Post la enkonduko de somera horsistemo la programoj komenciĝos unu horon pli frue. Esperantistoj, en kies gepatra lingvo mankas elsendoj, eble skribu al Hungara Radio, petante enkondukon de Esperantlingvaj dissendoj. Adreso: Hungara Radio.

EN ANGLA LINGVO

Por Eŭropo:
12.00–12.20 11910, 9835, 9585, 7155, 6110, 6025 kHz (krom sabate kaj dimanĉe)
21.00–21.30 11910, 9835, 9585, 7200, 6110, 6025 kHz

Por Norda Ameriko:
2.00–2.30 17710, 15220, 11910, 9835, 9585, 6000 kHz (krom lunde)
3.00–3.30 17710, 15220, 11910, 9835, 9585, 6000 kHz

Por Azio:
14.30–15.00 21525, 17710, 15220, 11910, 9835, 9585 kHz (krom sabate kaj dimanĉe)

Por Aŭstralio kaj Nov-Zelando
10.30–11.00 21525, 17710, 15220, 15160, 11910, 9835 kHz

DX-programo
Por Eŭropo:
Marde kaj vendrede:
15.15–15.30 11910, 9835, 7275, 7200, 6025, 6000 kHz

Por Norda Ameriko:
Merkrede kaj sabate:
4.00–4.15 17710, 15220, 11910, 9835, 9585, 6000 kHz

EN GERMANA LINGVO

Por Eŭropo:
17.30–18.00 11910, 9835, 7200, 6110, 6025 kHz
20,30–21.00 11910, 9835, 7200, 6110, 6025 kHz

Gruss und Kuss:
Sabate:
13.00–14.00 11910, 9835, 9585, 7155, 6040, 6025 kHz

Dimanĉe:
13.30–14.00 11910, 9835, 9585, 7155, 6040, 6025 kHz

DX-programo
Por Eŭropo:
Merkrede:
15.15–15.30 11910, 9835, 7275, 7200, 6025, 6000 kHz

Sabate:
14.00–14.15 11910, 9835, 9585, 7200, 6110, 6025 kHz

Por Aŭstrio:
12.20–12.40 11910, 9835, 9585, 7155, 6040, 6025 kHz (krom sabate kaj dimanĉe)
19.30–20.00 11910, 9835, 9585, 7200, 6040, 6025 kHz

Dimanĉe:
9.00–10.00 11910, 9835, 9585, 7155, 6040, 6025 kHz

EN ITALA LINGVO

Por Eŭropo, Proksima Oriento kaj Norda Afriko:
12.40–13.00 11910, 9835, 9585, 7155, 6110, 6025 kHz (krom sabate kaj dimanĉe)
16.00–16.30 11910, 9835, 7275, 7200, 6025, 6000 kHz (krom dimanĉe)
18.00–18.30 11910, 9835, 9585, 7200, 6110, 6025 kHz

Sabate:
14.30–15.00 11910, 9835, 9585, 7200, 6110, 6025 kHz

Dimanĉe:
13.00–13.30 11910, 9835, 9585, 7155, 6040, 6025 kHz

DX-programo
Por Eŭropo:
Lunde kaj ĵaude:
15.15–15.30 11910, 9835, 7275, 7200, 6025, 6000 kHz

EN HISPANA LINGVO

Por Eŭropo:
13.00–13.20 11910, 9835, 9585, 7155, 6110, 6025 kHz (krom sabate kaj dimanĉe)
22.00–22.30 17710, 15220, 11910, 9835, 9585, 6025 kHz

Por Suda Ameriko:
23.00–23.30 17710, 15220, 11910, 9835, 9585, 6025 kHz
24.00–0.30 17710, 15220, 11910, 9835, 9585, 6025 kHz (krom lunde)
1.00–1.30 17710, 15220, 11910, 9835, 9585, 6025 kHz

DX-programo
Por Suda Ameriko:
Marde kaj vendrede:
4.05–4.20 17110, 15220, 11910, 9835, 9585, 6000 kHz

EN TURKA LINGVO

Por Eŭropo kaj Malgranda Azio:
11.20–11.40 11910, 9835, 9585, 7155, 6110, 6025 kHz (krom sabate kaj dimanĉe)
16.30–17.00 11910, 9835, 7275, 7200, 6025, 6000 kHz
18.30–19.00 11910, 9835, 9595, 7200, 6110, 6025 kHz

Sabate:
8.30–10.00 11910, 9835, 9585, 7155, 6040, 6025 kHz

Dimanĉe:
7.00–9.00 11910, 9835, 9585, 7155, 6040, 6025 kHz
11.20–13.00 11910, 9835, 9585, 7155, 6110, 6025 kHz

EN GREKA LINGVO

Por Eŭropo, Proksima Oriento kaj Norda Afriko:
11.40–12.00 11910, 9835, 9585, 7155, 6110, 6025 kHz (krom sabate kaj dimanĉe)
15.30–16.00 11910, 9835, 7275, 7200, 6025, 6000 kHz
17.00–17.30 11910, 9835, 7275, 7000, 6025, 6000 kHz

Sabate:
7.00–8.30 11910, 9835, 9585, 7155, 6040, 6025 kHz
11.20–13.00 11910, 9835, 9585, 7200, 6110, 6025 kHz

Ferenc Glatz

Historiografo kaj nuntempo

La aŭtoro de tiu ĉi artikolo estas kandidato de la historiaj sciencoj, scienca sekciestro de la Historiscienca Instituto de la Hungara Akademio de Sciencoj, kaj respondeca redaktoro de la kvaronjara populara revuo *História*. Tiu ĉi revuo entreprenis pioniran taskon sur la kampo de vasta diskonigado de la historisciencaj esplorrezultoj pri la proksima pasinteco de Hungario. Ankaŭ la suba artikolo aperis en tiu revuo, aŭtune de la pasinta jaro; ni supozas, ke ĝiaj interesaj – kaj eble diskutvekaj – konstatoj havas intereson ne nur por la hungara publiko.

Ĉu la nuna historiografo povas pensi sen nostalgia envio pri siaj kolegoj, kiuj vivis antaŭ multaj jarcentoj, kaj kun trankvila aplombo ili surpaperigis la eventojn de sia proksima pasinteco, tiom grava por ĉiuepoka nuntempo? La nuna historiografo ĝemadas sub la ŝarĝoj de tiuj skrupuloj, kiujn en lia pensado kreis la „kompetenta" historiografio de la 19-a jarcento. Tiuj skrupuloj argumentas, ke historiografo bezonas specialan fakan metodologion ĉefe por elimini ĉe la pritakso de la pasinteco tiujn influojn, kiujn povas trudi al li la nuntempo. Li trenas kun si tiun skrupularon de konscienco, kaj ĝin senĉese nutras en li ankaŭ unu el la ĉefaj karakterizaĵoj de nia epoko: la instuticiigo de la intelekta vivo. Pro tio la pritaksadon de la pasinteco oni rigardas jam kvazaŭ organika parto de la ideologio de la nuntempo; kvazaŭ ŝajnas inversiĝi la klasika principo de la pasintjarcenta politika pensado („kiu havas la pasintecon, tiu havas ankaŭ la nuntempon"), kaj oni povus diri, ke, kiu havas la nuntempon, tiu havas ankaŭ la pasintecon. Kaj la historiografon premas ankaŭ la supozata aŭ reala, senaplombiga „kolero", kiun povas elvoki liaj prijuĝoj pri la eventoj de la proksima pasinteco el la ankoraŭ vivantaj partoprenintoj de tiuj eventoj.

„La historia perspektivo". Marksista historiografo ĉiam emfazas, kiel gravan socian funkcion lia scienco povas havi, helpante al la ankoraŭ aktivaj generacioj orientiĝi en la historio de la ĵusa pasinteco, kiun ili mem travivis: la scienco povas prilumi certajn politikajn-ekonomiajn cirkonstancojn de antaŭ kelkaj jardekoj, kiujn cirkonstancojn ne povis rimarki tiuj personoj, kiuj mem agante partoprenis en la konfliktoj kaj bataloj. Oni povas facile rekoni, ke neniu politika aganto, sur ajna nivelo de la hierarkio, povas havi plenan superrigardon pri la multtendencaj eventoj kaj latentaj interrilatoj de la moderna ŝtata (internacia kaj enlanda) vivo de sia propra epoko, kiel ajn vastan informan bazon li disponas. Inter la politikaj agantoj de la pasintaj jardekoj kaj la nunaj historiografoj la diferenco de opinioj estas neevitebla, kiam ili dialogas pri la socia-politika vivo de epoko, kiu apenaŭ inicis en la direktad-mekanismajn sekretojn de la potenco eĉ nur iom pli vastan tavolon de aktivaj partoprenantoj en la direktado de la socio. Parolante konkrete pri la situacio hungarlanda aŭ pri tio en aliaj socialismaj landoj, oni povas konstati, ke post la dua mondmilito la cirkonstancoj ne ebligis al la ampleksa tavolo de politikaj agantoj vastan politikan publikecon kaj per tio formadon de prijuĝoj surbaze de veraj informoj: unue malhelpis tion la rapida ritmo de politikaj-potencrilataj tranformiĝoj, kaj poste, en la unua fazo de la proletaraj diktaturoj, la personkulta misformado de la metodoj de politikado.

La iama partopreninto de la eventoj, nun, jam maljuna, ordiganta la travivaĵojn kaj spertojn de sia vivo, iomete eĉ sistemiganta ilin, aŭdas de la historiografo kun ekscitiĝo akompananta ĉiun rekonsciiĝon, ke malantaŭ la emociigaj, vere stimulaj amasaj agadoj de la junaĝo kaŝis sin ofte banalaj, nure taktikaj motivoj de malvasta rondo de potenchavantoj...

„Siatempe..." Malsame rigardas al la proksima pasinteco la historiografo, kaj tiu, kiu agante travivis ĝin. La pensado pri la socio havas iun nepre aperantan karakterizan trajton: kiel ajn objektive aganta politikisto kapablas submeti al kritiko siajn pli fruajn opiniojn, kaj observi la eventojn de antaŭ kelkaj jardekoj aplikante la poste klariĝintajn vast-dimensiajn interrilatojn de faktoj, kiam li aŭdas la pritaksadon fare de nuna historiografo, tuj modifiĝas lia pensoreflekso kaj li demandas: se *siatempe* oni prenus kiel bazon de sia agado la pritaksojn de la nuna historiografo, ĉu oni entute trabatalus tiujn batalojn? Ja en nuntempa lumo povas ŝrumpi la signifo de iuj bataloj, kiujn siatempe oni supozis decide gravaj por la establo de la nova socio. Kaj vane nuntempa historiografo diras gravega aliajn plenumojn de la samaj personoj, ili insistas ĉe la vidpunktoj kaj valorhier-



arkio, laŭ kiuj siatempe ili ordigis siajn farendaĵojn. La konfuzo estas neevitebla: la travivinto lokigas la eldiron de la historiografo sur la kampo de la siatempaj politikaj bataloj, kaj rigardas ĝin, kiel eldiron de unu el la partoprenintoj de la siatempa batalo.

Reaktiviĝas ne nur la valorhierarkio sed ankaŭ la *metodoj de politikado el la pasinta, kaj historiografie revivigata epoko,* kaj tiuj ambaŭ lukte alfrontas la analizojn, faritajn de la postepoko. Dum la nunaj jardekoj en la orienteŭropaj socialismaj landoj kun okulfrapa klareco eksponiĝas tiu ĉi konstanta, latenta luktado de la historiografio kaj la „rememorantoj". La historiografo devas paroli al tiaj generacioj pri ties propra junaĝo, politika starto kaj politika zenito, kiuj generacioj – pro la jam menciitaj abruptaj reĝim-ŝanĝiĝoj – havis malmultan eblon kutimiĝi al toleremo koncerne opiniojn, diferencantajn de la iliaj. La historiografo devas antaŭvidi, ke liajn pritaksojn la travivintoj kaj rememorantoj akceptos kun la sama (mal)toleremo, kun kiu ili traktis siatempe siajn aliancanojn aŭ kontraŭulojn.

La iama aganto, konscie aŭ ne, havas apologian pretendon al la historiografio. Eĉ en tiuj socioj, en kiuj politikiston, flankenŝovitan pro lia opinio aŭ mispaŝo, dum la pasintaj jardekoj ne minacis perdo de la ekzistorimedoj aŭ tiu de civitanaj rajtoj. Neniel do mirindas, se tiu apologia pretendo ekstreme ŝvelas en la pensado de generacioj, plenkreskintaj dum akraj bataloj, kiuj bataloj fulmrapide kapablis plene forfermi el la publika vivo sociajn grupojn aŭ individuojn. Eblas ankaŭ diri: *la publikan pensmanieron de forpasintaj epokoj tre precize karakterizas tio, kiom ĝiaj reprezentantoj poste kapablas subpremi sian internan apologi-pretendon al la historiografio.*

„Laŭ la scienco..." La grava virto de la historiografo – la kapablo „remeti" sin mem en la traktatan epokon – povas esti ankaŭ fonto de la plej ofta eraro de historiografoj. Facile povas okazi, ke historiografo elpaŝas el sia propra pozicio, kaj aliĝante al iu el la kunbatalantaj partioj, kiel Zeŭso sidanta sur Olimpo, provizas per armilo la batalantojn, kaj prezentas la batalon rigardante ĝin tra la binoklo de unu partio. Tiu ĉi malĝusta historiografa sinteno, kiu minacas nian prijuĝan kapablon ĉiam, kiun ajn epokon ni pritaksas, povas atingi danĝerajn dimensiojn, kiam temas pri esplorado de la proksima pasinteco. Estante ankaŭ ni mem partoprenantoj de ideologia batalo, havante la proprajn poziciojn en la ideologiaj frontoj, facile ni inklinas rigardi „kreantoj de la estonteco" nur la „anticipintojn" de niaj nunaj opinioj. Facile ni forgesas pri tio, ke la historio estas multdimensia, kaj la nuntempo estas konsekvenco ne nur de tio, kion ni reliefigas kiel „antaŭaĵon", kiun volonte ni akceptas daŭrigi, disvolvi. Facile ni forgesas pri la jeno: *la nuntempo estas kunfandaĵo de ĉiuj tiuj faktoroj kaj tendencoj, kies kunbatalado naskis ĝin.* Historiografo devas vidi: *ankaŭ tiuj iamaniere „daŭras" en la nuntempo, kiuj pli frue estis la plej vervaj kontraŭuloj de la venkintoj en la batalo, eĉ se tiuj malvenkintoj falis en la batalo...*

Historiografo inklinas forgesi ankaŭ pri tiu cirkonstanco, kiun ofte li aludas, diskutante kun tiuj, kiuj rememoras pri la pasinteco surbaze de la propraj travivaĵoj: pri tio, ke la historiografo de la postepoko vidas ankaŭ la estontajn konsekvencojn de la traktataj eventoj. Konante la pluan evoluon de la procezoj, ofte li inklinas ne nur ŝanĝi la dimensiajn proporciojn de la pli fruaj faktoroj, kaj pligrandigi la pli fruan rolon de tiuj, kiuj en la momento de la pritaksado povas esti rigardataj kiel venkintoj, sed, ne povante kontraŭstari la tenton, li prenas pozicion ie inter la kunbatalantaj partioj, kaj en pozicio de „ĉioscia juĝisto el la postepoko" li formas sian starpunkton, kvazaŭ disdonante konsilojn: kiel oni devus fari „siatempe"...

* * *

Unu el la plej akravidaj historiografoj de ĉiuj epokoj, Tacito diris antaŭ preskaŭ dumil jaroj: la pasintecon oni devas esplori *sen kolero kaj simpatioj* (sine ira et studio). Nuntempaj historiografoj prezentas siajn pritaksojn ne nur al malmultaj kleruloj, sed al publiko pli vasta, kiu inkluzivas ankaŭ multajn aktivajn travivintojn de la pritraktitaj eventoj; surbaze de la spertoj historiografoj opinias, ke la averton de la saĝa romiano devus obei ankaŭ tiuj travivintoj, propre en sia rilato al la historiografoj.

Tradukis: V. *Benczik*

Mihály Ladányi

Demandoj

Nur la krucumo, Sinjoro?
Jam eĉ ne vinagra spongo?
Komence temis pri du latronoj,
kio 'stas ĉi bando ĉirkaŭ mi?

Tradukis: János *Tóth*

Sesdekjara esperantista agado

Alfonz Pechan okdekjara

Ĉiam estas ĝojinde, se iu el niaj amikoj atingas altan rondciferan aĝon. Estas sciate, ke la aĝo de la homoj nuntempe ĝenerale longiĝas, kvankam tio estas propre relativa fenomeno. La psalmisto jam antaŭ kelkmiloj da jaroj notis, ke „la daŭro de nia vivo estas sepdek jaroj, aŭ okdek jaroj kaj ilia plimulto estas penado... kaj ĝi forkuras rapide..."

Nu, estas sendube, kiu en nia erao plenumas sian okdekan jaron eĉ konsiderante la longiĝintan homan vivon, ricevis kelkajn jarojn el ili, kvazaŭ donace. Kaj tiom pli ni ĝojas, se ni povas raporti pri tia ĝojinda afero el la rondo de niaj samideanoj.

Jes, nia respektinda amiko, konata vortaristo en Hungario, nun transpaŝis sian okdekan jaron kaj ni ĝoje salutas lin, kiel elstaran veteranon de la hungarlanda E-movado.

Li naskiĝis en la sudhungarlanda urbo Pécs. Tie li studis ĝis sia abiturienta ekzameno. Jam en 1920 li konatiĝis kun Esperanto, en la gepatra domo. Poste translokiĝinte al Budapeŝto, li fariĝis studento de universitato kaj akiris diplomon, kiel mezlerneja profesoro pri matematiko kaj fiziko. La juna pedagogo verkis lernolibrojn pri la menciitaj studobjektoj kaj pri meteologio.

Li komencis partopreni en la esperantista vivo ankoraŭ en Pécs, poste en Budapeŝto. Dum 60 jaroj li instruis Esperanton, ofte en malfacilaj tempoj, ankaŭ en la Budapeŝta universitato, krome en mezlernejoj kaj plej multe en vesperaj kursoj, por plenkreskuloj.

Li aktive partoprenis la organizan kaj propagandan laboron inter esperantistaj pedagogoj. Dum dek jaroj li estis prezidanto de la Hungara Esperantista Pedagogia Asocio kaj ekde la fondiĝo en 1939 ĝis nun prezidanto de la Landa Ekzamena Komitato. Li multe penadis pri tio, ke la ekzamenoj – je ĉiuj gradoj – havu ĉiam pli altan nivelon. La bona renomo de la hungarlandaj E-diplomoj instigis multajn eksterlandanojn por akiri tian diplomon, precipe superan diplomon pri lingvoinstruado kaj tradukarto.

Krom liaj pedagogia agado kaj tiuj pri turismo kaj sciencoj, lia plej ampleksa laborado estis plenumita sur la teritorio de leksikologio. En lia redaktado aperis Esperanta-hungara kaj hungara-Esperanta vortaroj en 1958. Ekde ĝiaj aperoj ĝis nun, tiuj ĝeneralaj vortaroj estas uzataj en Hungario. La unuan eldonon sekvis kvar pluaj en la jaroj 1961, 1964, 1968 kaj 1981. Tiuj vortaroj – kompare al aliaj dulingvaj Esperanto-vortaroj – estas inter la plej riĉaj. Ili enhavas sume ĉ. 20 000 vortojn, krome 320Ω esprimojn kaj frazekzemplojn. Rezulte de la kvin eldonoj, el tiu vortaro vendiĝis ĝis nun ĉ. 60 000 ekzemploj.

En la jaro 1968 aperis Turisma Vortaro de Pechan, ambaŭ partoj en unu volumo. El tiu dudirekta vortaro ĝis nun estis venditaj ĉ. 5 500 ekzempleroj. Tiaspeca vortaro en Esperantujo ĝis nun estas unika.

De la 1970-aj jaroj ĝis nun aperis 4 volumoj de geodezia fakvortaro, seslingva (angla, Esperanta, franca, hungara, germana, rusa) far kvinnombra laborkomunumo, en kiu partoprenas ankaŭ A. Pechan. La Esperantan parton sub la ĉefredaktado de d-ro O. Haszpra pretigis kvarmembra laborkomunumo, en kiu Pechan same kunlaboris. Pluaj 1-2 volumoj ankoraŭ estas planataj.

Similan vortaristan laboron li faras en la hungarlanda fervojista terminara komisiono, por granda, kvinlingva fervojista fakvortaro.

Li estis, respektive estas lingva kontrolisto de pluraj hungarlandaj E-gazetoj (Hungara Vivo, Hungara Fervojista Mondo, Juna Amiko ktp.)

Kiel amatora muzikisto, dum esperantistaj aranĝaĵoj li ofte amuzis la aŭskultantaron per la kamermuzika koncerto de siaj filoj.

Jen la multflanka agado de nia prezentita veterano. Kiam ni kore gratulas lin, okaze de lia baldaŭa naskiĝtaga (1981–04–21), samtempe ni deziras al li ankoraŭ multajn fruktodonajn jarojn kun daŭra, bona sano.

István *László*

John J. Francis

Kolono

Starante tie
subteninte;
starante kie
amaso premis,
pezoj konverĝis
en unu:
de supre rektaj,
oblikvaj oblikve,
kaj kurbaj kurbantaj
laŭ arkoj,
arkantaj al-de kun-subtenantoj.
Tiuj akceptis pez-porciojn,
kaj ĉe l' divido la premad' malfortis.
forkesemante
forkonsumante
en du kolonoj
sin.

Kun-subtenintoj
okupis spacon:
la spaco
kiun okupis la konstru-pezo
ekzistas:
la precizaj konturoj
kiuj fermis ĝin
ekzistas kie
l' amaso premis.
Pilastro staras
sama.
Kie la fortoj
kiuj subtene
rezistis rekte, arke, oblikve?
Forkonsumante?
Kie la rezulta malstreĉiĝo
de la ŝtono
starante tie
kie l' amaso
premis?

Edwin de Kock

Tankao

Ŝi atentigis,
ke tamen duan fojon
flamas la rozo.
Jes, kara, mi jam scias
pri ĉi aŭtunalmozo.

ORIGINALA POEZIO

Lina Gabrielli

La birdeto

Manfried de Haugesund
kaj ŝia edzo Sigmund
hieraŭ invitis
min hejmen,
kun Ole kaj Olav,
por vespermanĝo
kaj antaŭ la foriro
ili donacis al mi
birdeton el lazura
porcelano.
Pentris ĝin Manfried
per artistinaj manoj.
Tiu donac' miriga
pensigis min pri ci,
libera pasero
el la nordo.
Mi vin sopiras!
Suspiras mi kaj ploras
pro nostalgio.

Nun el la ŝipo
kiu portas min al Bergen,
mi ne vidas paserojn
vagantajn en la aeron;
mi nur vidas
en la maron
mergiĝi
la mevojn.

Amato, mi memoras
ciajn okulojn
fikse rigardi min;
ciajn okulojn lazurajn
kiel la birdeto
de Manfried.

Oldřich Knĭchal

La vivparabolo

Unua stumbloiro
unuaj paŝoj
ekkuro
supreniĝo
ascendo spirhalta
renkonte
al susur' flugila
de l' mortanĝelo

Aldo de' Giorgi

En la parko

En la parko pensema
la diafana tremolo
pulsetas virguline
sub la karesoj zefiraj.
L' azaleo skarlata
sin oferas trepide
al la voluptaj kisoj
de l' saliko babilona.*
Sur la ondetanta gazono
timide okulumas
la leontodbutonoj.

En la angulo kaŝita,
tie funde,
sub la glicina spiro,
nia benketo de tiam
vakas.

* latine: salix babilonica = pendanta saliko

Julius Balbin

Kranio

Dum pluraj jaroj
mi ne vidis mian vizaĝon

Tri tagojn
post la liberigo
en armea hospitalo
mi petis flegistinon
enmanigi al mi
speguleton

Miaj fingroj ekfrostis
je la vido
de miaj okuloj
elŝvelantaj
el kranio
kiu iam estis
mia vizaĝo

Adalberto Hules

Homo sur la rondstrato

Rondstrato.
Tion bonvolu prezenti al vi tiel,
ke ekzistas strato
ia, nenien kondukanta, nur por si mem ekzistanta,
ekstere mur' kaj interne mur',
farbitaj flavaj,
altaj je tri etaĝoj.
Do ĝi entute
memorigas pri strato ordinara,
krom ke neniu sur ĝi iras.
Kaj nun bonvolu prezenti al vi homon
en griza jako,
en griza pantalono:
mi bele metas lin inter la muroj
memorigaj pri vicoj de domoj.
Kaj tiu homo
en maniero de la pleja memkomprenebleco,
sen signo de ajna ekmiro
ekiras sur mia rondstrato.
Li iras, iras
(ne povante scii, kiam rond' finiĝas:
la muroj estas ja ĉie egalaj),
iras senhalte,
per paŝoj samritmaj.
Ĉu tagojn? Ĉu semajnojn? Ĉu dum jarcentoj?
Tio estas tute ne konstatebla.
Nome sur tiu ĉi rondstrato
estas konstante la dekunua antaŭtagmeze.

Imre Szabó

La okan tagon

La okan tagon de la mondokreo
abrupte krevis tero kaj ĉielo.
Falis ora trono dia.
Falis ora trono dia.

Li sidas plore kiel etinfano
kaj tremas mondruinoj en la mano.
Dio, kiu perdis dion.
Dio, kiu perdis dion.

Kaj okan tagon de la amokreo
ĉielon nian palpis la pereo.
Palis nia amo dia.
Falis nia amo dia.

El „Hungara Antologio"

En 1931 aperis la internacia poezia antologio de Kalocsay: „Eterna Bukedo". Post kvindek jaroj, en 1981 Hungara Esperanto-Asocio eldonis ĝian preskaŭ trioble ampleksigitan duan eldonon: la duvoluman verkegon „Tutmonda Sonoro". En 1933 eliris en Budapeŝto „Hungara Antologio" redaktita kaj grandparte tradukita de la sama Kalocsay. Decas do, ke en 1983 aperu ampleksigita dua eldono de tiu multe laŭdita Antologio – ĝin eldonos la ŝtata Eldonejo Corvina. Antaŭvideble la verko enhavos 241 poemojn kaj prozaĵojn de 73 hungaraj aŭtoroj, ekde la komencoj de la hungara literaturo ĝis la nuntempo. La grandega tasko signife aktivigis hungarajn esperantistajn tradukistojn; ĉi-sube ni publikigas kelkajn fruktojn de tiu aktivado.

Janus Pannonius
(1434–1472)

Laŭdo de Panonio

Kion ĉiu legis, nur donitis de la tero Itala,
nun jam estas ĝi leganta versojn de la land' Panoni'.
Grandas vere tiu gloro, pro ili de mi akirita,
sed mia patri' pli brilas, gloras, tamen pere de mi.

Tradukis: Péter András *Rados*

Gábor Garai
(1929–)

Por la falintoj

Ni devus fari ion fine
por la falintoj de l' epoko paca.

Antaŭ ol ili falus.

Paradpiked', funebra ĥoro,
flirtanta torĉo ne sufiĉas,
nek denombri la heroajn farojn:
ke ili sinofere
kaj senlace...

Ĉar ne batalo, ne laboro
mortigas ilin:
en polvodoraj papero-maroj
sufokiĝadas ili; kaj la ŝaŭmo de la
svarmado superflua atingas buŝon;
sur la piedoj muke serpentumas
parolo amfibia;
fumnuboj de senfinaj pritraktadoj
nigrigas striktiĝantajn pulmojn,
en la stomak' kirliĝas ŝtonoj
de la reglutigaj frazoj,
miksite de konjako-glutoj
varmetaj de akceptoj afablumaj;
kaj ĉiutage antaŭ ol
elpaŝus ili preni aereton freŝan,
eksonas telefon-ekzekutisto,
plektante fridajn fingrojn sur la
koron;
kaj ili nokte per torporaj brakoj
brakumas montojn de la senaferaj
aferoj, sin per memgenero
plimultigantaj,,
nearanĝipovaj;

ĝis kiam harprenite
mateno ilin skuas,
kaj korpon ŝvitan ĝi relokas
en kaĝon: jam kutiman,
fumodoran, telefonpepantan,
lakitan, remburitan, – kaj
komencas ree ĉio –
ĝis morto.

Ĉar ne batalo, ne laboro
mortigas ilin. –
Paradpiket', funebra ĥoro,
flirtanta voĉ' – ve – ne sufiĉas.

Ni devus fari ion fine
por la falintoj de l' epoko paca...

Tradukis: Julio *Varga*

István Vas
(1910–)

Kiam la rozoj ekodoris

Ĉu vi memoras? kiam rozoj ekodoris
ne plu estis ni jam junaj –
la domon tombokrucoj ĉirkaŭfloris;
en kor' mortintoj kunaj.

Ni sciis: nur ŝtelaĵo la feliĉo,
kvankam edzo kaj edzino
rigardas, kiel pompas la rozuja riĉo,
ame en animo.

Griziĝis multaj viaj haroj tiujare –
memoru! kaŭzoj gregis.
Sed kiu restis nigra, tiu malavare
pli ol iam brilegis.

Al vi en la okulojn, ĉi spegulojn de admiro
rompitajn lumojn kaŝis la teruro,
kaj konfuziĝis tie la purverda brilo,
sed min ravis ĉi nebulo.

Matene ni vekiĝis kun jubilego pia,
vi pro l' ĝarden', mi pro vi, –
kaŝiĝis milde dum tiu somero nia
Anglio, Veneci'.

Kiel aldonon strangan, danĝeran foran foron
la morgaŭon ni suspektis –
tiusomere estis: al vi en la koron
la vintra vent' sin plektis.

Antaŭe estis por ni pli gajaj someroj,
memoru! sed bela ĉi solis.
En la ĝardenon klinis sin la mutaj tombejoj,
kiam la rozoj ekodoris.

Tradukis: Imre *Szabó*

La harmonia mondo de István Szőnyi

La kurbo de Danubo norde de Budapeŝto estas unu el la plej pitoreskaj regionoj de Hungario. Tie la granda rivero lante serpentumas inter silentaj montetoj, en kies faldoj kuŝas vilaĝoj kaj urbetoj. Unu el tiuj urbetoj estas Zebegény. Urbo kun trankvilaj stratoj, koketaj domoj, puraj kortoj, multaj fruktarboj.

La elstara hungara pentristo István Szőnyi (1894–1960) loĝis kaj laboris en Budapeŝto, sed multajn jarojn li pasigis en Zebegény. El la pentraĵoj de Szőnyi, egale ĉu pejzaĝoj aŭ portretoj, radias la sama kvieto kiu vualas la montetojn ĉe Zebegény. Szőnyi trovas la harmonion de la naturo en la plej etaj kaj simplaj detaloj. Lia bildo „La ĝardena benko" elokvente montras tion. La pentraĵo ŝajne ne havas temon; printempa ĝardeno kaj benko banata de sunradioj, sed la artisto kvazaŭ haltigis la tempon kaj pere de la solcea benko en la silenta ĝardeno, li sukcesis esprimi la majestan trankvilon de la naturo.

Tenera liriko radias ankaŭ el la pentraĵo „Post pluvo". La bildo same kiel „La ĝardena benko" ne rakontas; ĝi nur aludas, emocie sugestas, kaj observante ĝin, ni kvazaŭ sentas, ke nur antaŭ nelonge la pluvo ĉesis, ekbrilis la suno kaj en la strata pluvmarĉeto respeguliĝas latbarilo. Tio estas ĉio, sed la artisto delikate atentigas nin, ke la beleco de la naturo ekzistas ankaŭ tie kie ni eĉ ne supozas.

Szőnyi ege ŝatis Zebegény kaj kvazaŭ senlace li pentris pejzaĝojn pri Zebegény kaj portretojn de ĝiaj loĝantoj. Tre karakteraj estas liaj pentraĵoj „Knabo paŝtisto", „La tombejo de Zebegény", „Zebegény vespere". En tiuj bildoj la talenta artisto sukcesis esprimi la trankvilon kaj ĉiutagan vivon de la eta hungara urbo.

Szőnyi postlasis riĉan kreadon; pli ol mil pentraĵojn. Lia tekniko ege varias: akvarelo, grafiko, oleofarbo, tempero...

Liaj bildoj estas unu tuta mondo en kiu dominas la trankvilo, kvieto kaj eterna harmonio de la naturo.

Georgi *Mihalkov*

Ombreloj

PANORAMO

Majstroj de argilo

Jam la okan fojon estis aranĝita tutlanda konkurso „Sebestyén Gerencsér" por potfaristoj. Naŭdek sep reprezentantoj de ĉi tiu praa – kaj denove tre populara – metio prezentis siajn konkursaĵojn al la ĵurio. La memorpremion gajnis Lajos Fazekas, potfaristo el Nádudvar. El la kreaĵoj, senditaj al la konkurso, estis aranĝita ekspozicio en la originalstile rekonstruita mezepoka fortikaĵo Siklós (departemento Baranya).

Agrikultura kunlaboro

La Agrikultura Esplorinstituto de la Hungara Akademio de Sciencoj en Martonvásár rezultoplene kunlaboras kun pluraj eksterlandaj esploristoj por novaj selektitaj maizo-hibridoj. Per eminentaj maizoj riĉigis la speco-sortimenton la jardekon longa kunlaborado kun francaj scienculoj. Tiaj estas la hibridoj *Anjou* kaj *United,* kiujn la hungaraj bienoj kulturas ĉiujare sur pli ol cent mil hektaroj. La kune selektita nova hibrido estas la speco „MVSC 1434", kiun nun elprovas la agrikulturistoj.

Ankaŭ la kunlaboro inter hungaraj esploristoj kaj tiuj en sciencaj institutoj de Usono rezultigis jam la aklimatigon de pluraj eminentaj maizspecoj en Hungario. Dum la lastaj jaroj la fakuloj de la du landoj ekzamenis pli ol 250 komunajn hibridkombinojn.

La plej nova speco, nomita Norma, naskiĝis el la komune faritaj eksperimentoj kun esploristoj de FRG. Ĝi eminente ekzameniĝis en la provoj; kaj por grajno-produkto kaj por verda furaĝo ĝi elmontriĝas elstara.



Premio el Kolonjo

Zsuzsa Garam, juna hungara fortepian-artistino ricevis la premion en la internacia pianokonkurso „Premio Tomassoni" en Kolonjo (FRG). La konkurson, aranĝitan de la Muzika Altlernejo de Kolonjo partoprenis 52 artistoj. La unuan premion gajnis Fred Höricke, FRG-ano.

Rejunigita placo

La Placo de Herooj, unu el la plej belaj placoj de Budapeŝto estis rekonstruita dum la lastaj monatoj. Oni renovigis ankaŭ la stratojn ĉirkaŭ la placo, la iluminilojn kaj la ponton malantaŭ la monumento, super la lago de la Urba Parko. Laŭ la originala desegno estas renovigita ankaŭ la pavimo de la impona bela placo.

PANORAMO

Glitumejo per sagaco

Nova artefarita glitumejo estis transdonita al la publiko en Leninváros, apud la Kemia Kombinato de Tisza. La glitumejo, ampleksanta 60 x 30 metrojn, naskiĝis el ideo pri energiŝparado. Nome dum la teknologia procezo de produktado de minerala sterko necesas la vaporigo de la fluida amoniako. Tion oni plenumis kutime en varmoŝanĝiloj hejtitaj per vaporo. Nun oni produktas glacion per la sama materialo, helpe de pli ol dudek mil metrojn longa tubaro.

Hospitalo por infanoj

Apud la urba hospitalo de Jászberény oni malfermis novan kvindeklitan infanhospitalon por la etaj malsanuloj de la regiono. La hospitalo instalita kaj provizita per ĉiuj modernaj instrumentoj, jam de novembro akceptas kaj kuracadas malsanulojn.

Memorkoncerto pri Louis Armstrong

Memorkoncerton prezentis la „Benko Dixieland Band" en novembro antaŭ plena salono en la Muzikakademio de Budapeŝto, sub titolo: „In memoriam Louis Armstrong". Tiam estis la deka datreveno de la morto de la mondfama ĵaz-muzikisto, tre populara ankaŭ en Hungario.

malmultekosta,
bongusta novaĵo

HOT-DOG

KOLBASO

48 Ft/kg



HÚSIPAR

REVUO DE REVUOJ

„Esperanto estas lingvo taŭga por dramaturgio: *ĝia fonetiko* igas ĝin facile aŭdebla, sen multa risko pri orela miskompreno; *ĝia gramatika strukturo* estas tia, ke oni aŭdas ĝin sen multa risko pri intelekta miskompreno; *por geaktoroj* estas facile paroli ĝin klare..." Ne klasika citaĵo – Marjorie *Boulton* enkondukas per ĉi vortoj artikolon pri dramoj en Eo, en kiu ŝi cetere plej alte taksas dum detala analizado *Songe sub pomarbo* de Julio *Baghy*. Sed anstataŭ diskuti, mi atentigas pri la ceteraj, same interesaj artikoloj de LA ESPERO, lertamane elektitaj ankaŭ el diversaj E-revuoj, tiel promesante al ĝi altan nivelon. La redaktoroj vidas klare ankaŭ tion, ke por propagandi *pri* aferoj de la movado (do *por* la movado!) necesas uzi nacian lingvon. Tial plezurigas i.a. la tripaĝa raporto pri nia Brazilia kongreso; bone servante la interesemon de ne-movadanaj legantoj, ĝi informis svedlingve pri riĉaj impresoj, vekante preskaŭ envion kunesti dum tiaj eventoj...

La menciitan vojon de publika propagando sekvas jam ekde pli ol 8 jaroj la hungarlingva MONDO kaj LINGVO (Világ és Nyelv) kun eksteraĵo simila al HV. Sekve ĝi kapablas havi pozicion en surstrataj gazetkioskoj inter la abunde sin prezentantaj koloraj magazinoj. Kaj serioza, kaj distra enhavo ankaŭ pri ajna lingvo-lernado, ne arogaj sed ofte spritaj aludoj al la „solvo de l' problemo" konsistigas la simplan sekreton. Ĵus oni povis „lerni" kiel la komputistoj D. *Fiatal* kaj G. *Mandler* instruis komputilon por prepari Eajn fakvortarojn...

Kuraĝe ekpropagandis franclingve TRANSALPA ESPERANTISTO en kaj apud Svislando, serĉante seriozan direkton probable ĉe universitataj rondoj. Almenaŭ tion signas la relative ampleksa eminenta skizo de profesoro *Bausani* pri historio kaj problemoj de artefaritaj internaciaj lingvoj. Artur *Bormann*, la prudenta observanto de INTERLINGVISTIKA INFORMA SERVO samtempe esprimis trosatiĝon pri la abundaj publikaĵoj traktantaj arkaiĝintajn lingvo-projektojn, plejofte superflue kaj nenion prezentantaj por la vivanta Eo; oni do *prefere* „koncentriĝu al Eo", sufiĉas foje nur rememorigi pri la pasinto, pri la mortintaj lingvo-provoj.

Kvankam mi ne kontestas, ke en la pasinto eblas trovi, se vere science ĝi esploriĝis, ian helpon por solvi problemojn, eĉ en nia movado, tamen la proporcioj devas ne inversiĝi. Ne estas hazarde, ke nek en ESPERANTO, nek en HV estas publikataj tn. planlingvistikaj studoj pri gramatikaĵoj de la „mortintoj", tia literaturo jam kuŝas sur la librobretoj, serĉemuloj (mi serioze esperas, ke la kompostisto ne tranĉos ĉi vorton) trovas ĝin. Sed la supre citita rekomendo vere turnis mian atenton al nia Bernard *Golden*, kiu bravege luktas favore al nia Eo, laste en OOMOTO. Li argumente pledas por eviti – dum neevitebla ampleksigo de nia vortaro – pluajn similsonajn vortojn (paronimojn), krom la jam ekzistantaj, kiaj estas ekzemple *dezerto, dizerti, diserti-(-aĵo), deserto.* Tutcerte eblas okaze elekti el *pli diversaj* fontoj; turistoj kaj taristoj (pardonon: literaturistoj kaj vortaristoj) bonvolu priatenti tiun aprobindan principon, eventuale ne ĝisfine mallongigi vortojn – kiel mi ĵus pekis...

E-O EN SKOTLANDO ankaŭ turnas sin, krom al valora beletro, al profundoj de Eo: pri ĝiaj fontoj publikigas artikolserion – pli precize: gravan studon – D.B.*Gregor* kun konata vastega ligvokono. Estus dezirinde havigi ĝin al la certe multaj interesiĝantoj; tamen antaŭ ol libroforme eldoni ĝin, estos rekomendinde ankoraŭfoje revizii, ja povas engliti eraretoj kaj prezentiĝi etaj mankoj, nepre superflue. (Por averti: la sono Ĉ troviĝas ne nur en la slavaj lingvoj, sed ankaŭ en G, It, Hungara; la itala S-ta Cecila ne pardonos tion!)

Kiu legas jam de multaj jaroj, kiel mi, la revuon sub titolo LA KANCER-KLINIKO – kiu dume renoviĝis aspekte plaĉe –, tiu konas ĝiajn ne facile ripeteblan spritan stilon kaj riĉan pensaron. Al tia persono ĝi vere ne estas prezentinda en kelkaj linioj; ja certe la bunte miksa, parodie paradoksema kaj bokse luktema, foje lakteme friponoza teksaĵo de sarkasmaj tekstaĵoj donas abunde kaj runde da plezuroj. Franca kaj Esperanta ĝi estas, sprite kaj mense, eĉ disigi ĉi flankojn mi ne povus rapide – sed kial? Aprecinda estis aparte la dinamisma „traktaĵo" pri la Niblunga Ringo – domaĝe la fina parto jam ne alvenis... maldomaĝe la fino estas cetere konata. Malpli la forresto de la (ne) apreca apreco mia-flanke. La brava emo de la revuo senheziti kaj almuriĝi, temojn jen liberpense, jen popolgvidiste (greke: demos-gogos; paida-gogos troveblas lerneje), aliefoje ses-vuale (vd. ĉe Salome) kaj seks-(v)uale, eĉ sensuale kaj senvuale prezenti, kvankam tiel ne ĉiam ion pre-senti, eĉ malpli pre-venti; nu, finfine fini, ĝi donas legemon, kvankam foje legomon. Sprito kaj spirito estas ĉiam bonvenaj, ne tre grave se jam-jam kiel ritoj al certaj direktoj. Junula vervo, ina inverso paras komune, kaj mi estos la lasta kiu okaze naŭze malgustan prenus kiel vere malĝustan. Gustoj rajtas ja diferenci, pli gravas la ideoj, la ŝercoj, ne grave ke ofte klaŭnaj. La Gaja Paĝo de nia serioza HV volonte klinas sian flagon antaŭ flegon de la Kliniko.

Ho, ne forgesi ankoraŭ gratuli al la 75a jubileo de la Grupo de Bilbao, al la vaskoj, al via brava, historiplena movado!

Ervin *Fenyvesi*

D-ro Ferenc László

La Internacia Jardeko por Provizado per Trinkakvo

Certe al multaj, kiuj malfermas la kranon kaj ĝuas la benojn de la viviga akvo, ne venas en la kapon tiuj dekmilionoj, kiuj sen sana trinkakvo vivas en multaj landoj, nek la dekmilionoj da infanoj, kiuj mortas jare pro malsanoj kaŭzitaj de infektita akvo. Ĝuste pro tiaj konsternaj faktoj estas ege salutinda la klopodo de Unuiĝintaj Nacioj por rapide likvidi tiun tristan situacion. Dum la 35a Ĝenerala Kunsido en novembro 1980, la jardeko 1981-90 estis deklarita *jardeko de akvo,* kaj fiksita la celo: fine de la jardeko la tuta homaro devas havi sian freŝan, sanan akvon!

Vere estas konsternaj la indikoj, kiuj atestas, ke sur nia Tero egaj homamasoj malhavas tiun elementan vivnecesaĵon. En la tn. tria mondo pli ol duono de la loĝantaro ankoraŭ ne havas konvenan trinkakvon kaj por la tri kvaronoj mankas sanitara prizorgado. La infektita trinkakvo kaŭzas la 80 procentojn de la malsaniĝoj. En Afriko troviĝas landoj, kie virinoj ĉiutage piediras por akvo 5-6 horojn, kaj aparte tragike estas, ke la pene hejmen portata akvo estas ofte infektita. En Sud-Ameriko kelkloke paŭzas la lernejoj dum la seka sezono, ĉar la infanoj devas foriri por akvo. La zorgojn pro la akvoprovizado, pro la infektita trinkakvo pligravigas, ke en multaj vilaĝoj mankas eĉ la bazaj higienaj cirkonstancoj. Neniel eblas bari la disvastiĝon de epidemioj, dum oni ĉerpas la trinkakvon el tiu rivero, en kiu aliaj lavas, eĉ uzas ĝin kiel necesejon.

La Mondorganizo pri Sanitaro demonstris, ke el ĉiuj homaj malsaniĝoj 80 procentoj devenas de la trinki, bani kaj lavi netaŭga akvo, kaj de la senhigiena homa ĉirkaŭaĵo. Pro, tiuj konstantaj danĝerfontoj la loĝantaron de la tria mondo minacas la sekvaj kvin grupoj de infektaj malsanoj:

1/ Pro trinkado kaj sinlavado per infektita akvo, pro tiel lavitaj nutraĵoj oni povas infektiĝi per virusoj kaj bakterioj kaj malsaniĝi je tifo, paratifo, ĥolero, inflamoj de stomako kaj intesto, infekta diareo, infekta hepatito. Je infekta diareo ĉiujare malsaniĝas ĉ. cent milionoj da homoj, kaj mortas 6 milionoj da infanetoj. Pluraj faktoroj akcelas la disvastiĝon de ĥolero; en 1979 okazis 500 milionoj da malsaniĝoj. En la tria mondo duono de la infanmortoj okazas pro la infektita akvo.

2/ Pro bano aŭ lavo en malpura, infektita akvo okazas gravaj infektaj malsanoj ankaŭ sur la haŭto kaj okuloj. Tiaj estas la traĥomo, skabio, lepro, konjunktivito, diversaj haŭtaj inflamoj kaj ulceroj. Nur pro infektiĝo je traĥomo ĉiujare malsaniĝas 500 milionoj, el kiuj multaj blindiĝas.

3/ Tre danĝeraj malsanoj povas okazi pro tiuj organismoj, ofte

Oni boras novan puton en vilaĝo



Akvorezervejo en la montaro Mátra



estiĝantaj en la akvo, kiujn disportas ankaŭ etaj animaloj, ankaŭ la fluo. Inter tiuj malamikoj la akvaj helikoj disvastigas la plej danĝerajn, la skistosomo-vermojn, kiuj kaŭzas la bilharziozon (Egiptia sangurinado).

Ofte per apenaŭ videblaj etaj kraboj disvastiĝas la helmintiazon kaj trihinozon kaŭzantaj hokkapaj platvermoj, tenioj (rubandvermoj), fadenvermoj kaj aliaj intestvermoj. Nuntempe en 70 landoj de la mondo entute 200 milionoj suferas je bilhariozo, kvankam la akvajn helikojn kiuj disvastigas la vermojn, oni multloke sukcese forigis el la irigaciaj kanaloj kaj rizkampoj, kaj tiel bremsis la disvastiĝon de tiu danĝera, longe latentanta malsano. Kiel «malsanoj de la mizero» estas menciataj tiuj, kiujn kaŭzas inteste parazitantaj vermoj; inter ili la askaridozo, kaŭzata de la fadenvermoj askaridoj, ĉiujare suferigas unu miliardon da homoj; la platvermoj, tenioj, en evolulandoj de Afriko, Azio kaj Latin-Ameriko jare malsanigas ĉ. 900 milionojn da loĝantoj.

4/ Aliajn amasajn malsaniĝojn kaŭzas etaj akvaj vivuloj, kiujn insektoj transigas en la homan organismon. Moskitoj, precipe kuloj kaj anofeloj disvastigas la unuĉelajn parazitojn, plasmodiojn, kiuj disvolvas la elefantiazon, kaj la virusojn, kaŭzantajn la flavan febron. Diversaj muŝospecioj transigas tiujn filariojn, kiuj kaŭzas la tn. «riverblindecon» kaj la letargian encefaliton, karakterizatan de dormemo. Sur la tropiko la pluvan sezonon amase sekvas tiuj malsaniĝoj, inter kiuj je malario ĉiujare malsaniĝas 160 milionoj da homoj, je elefantiazo 250 milionoj, kaj je riverblindeco 30 milionoj.

La puto plezurigas per pli bona akvo

5/ La nesana ĉirkaŭaĵo, la manko de akvo, kaj la senhigienaj cirkonstancoj kune prezentas fekundan grundon por multaj infektaj malsanoj. Ekzemple la internaj malsaniĝoj pro parazitaj vermoj ĝenerale okazas pro la infektita akvo kaj ankaŭ pro la lokaj, nesanaj cirkonstancoj.

Ĉio ĉi montras, ke la infektita akvo estas kaŭzanto de tre multaj malsanoj. La vere salutinda grandioza programo de UN celas almenaŭ du miliardojn da homoj provizi per sana trinkakvo kaj per konvenaj bazaj sanitaraĵoj; atingi, ke ĉiu vilaĝo havu almenaŭ unu puton kun bona trinkakvo! Laŭ la fakuloj, la plenumo de tiu programo kostos ĉ. 5-600 miliardojn da dolaroj. La dekjara programo, kies esencon vidu en la slogano «Sanan trinkakvon al la mondo!», bezonas gigantan sumon, kiu estos tre malfacile akirebla. Sed estas fakto, ke la tuta dekjara programo kostos malpli ol la tutmonda armado dum unu jaro.

Estas iel ajn, la programo de la Internacia Jardeko por Provizado per Trinkakvo kaj Sanitaro, lanĉita de UN, estas imperativa tasko, kiu devos realiĝi por la venonta bono de la homaro, kaj tiucele ĉiu nacio havas sian devon. Hungario kompreneble partoprenas laŭ siaj ebloj en la efektivigo de la programo: pluraj centoj da scienculoj, esploristoj, inĝenieroj kaj konstruistoj de hidrologio kaj koneksaj branĉoj jam nun laboras en la evolulandoj.

Ni mencias nur kelkajn el tiuj laboroj: priserĉo de akvo kaj ekspluato de karstakvo en Libio kaj Mongolio; konstruado de akvoprovizejo kaj kloakakvopurigejo en Irako, Alĝerio kaj Niĝerio; reguligo de rivero Niĝero. Multaj evolulandoj laŭ hungara modelo kaj kunlaboro organizas sian hidrologian servon. La agado de la projektantaj inĝenieroj estis alte aprecita per la Premio Afrika, kiun oni aljuĝis en 1980 por la hidrologia projekta instituto VIZITERV. Aparte gravas la edukado de fakuloj. En Hungarlandaj universitatoj, altlernejoj, eĉ en fakaj mezlernejoj studas grandnombre venontaj fakuloj de multaj evolulandoj, sed krome ankaŭ surloke estas ofte organizataj fakaj kursoj. Tre sukcesa eksportaĵo montriĝis la plena instalo de kompletaj, fakedukaj centroj, al kiuj estas aldonata eĉ la plena edukprogramo kaj la preparo de ĝiaj instruontoj.

Depost jaroj jam internacian plaĉon akiris la perfektiga kurso de la hidrologia scienca instituto

VITUKI. Ĝin partoprenas regule fakuloj el 15-20 evolulandoj.

Apud tiuj agadoj por la programo de la Jardeko, enlande ĝi havas plejparte nur simplan valoron, kio tamen pravigas la tendencon meti en fokuson la sanan trinkakvon kaj la protekton de la ĉirkaŭaĵo de akvoj.

Sana trinkakvo en Hungario

Ok milionoj da loĝantoj estas provizataj per kondukita akvo, al kiuj ĝis 1985 aldoniĝos ankoraŭ 800 miloj. La kondukitan akvon ĝuos en 1990 jam 90-92 procentoj de la tuta loĝantaro, kio atingas preskaŭ la plenan, ekonomie eblan provizadon. Unuflanke estas tute natura la akcela kresko de akvo-postuloj, sed aliflanke estas grava zorgo, ke la kanalizado relative postrestas: en 1980 la triono de la loĝejoj estis ligata al la kanalaro, kaj en 1985 tiu proporcio atingos 36-37%. Tio signifas, ke apud 400 mil nove akvoprovizataj loĝejoj kreiĝos nur 200 mil kanalizitaj. La mankanta kanalizado kaŭzas ne nur malboniĝojn de la akvokvalito, sed en multaj loĝlokoj pro tio malagrable altiĝas la nivelo de la grundakvo.

La zorgoj do ne malpliiĝas, kvankam la ŝtato investas tre altajn sumojn por protekti la akvokvaliton. Antaŭ 1980 jam rapide multobliĝis la kapablo de la kloakakvo-purigejoj; en la nuna kvinjaro ĝi kreskos per 400 mil m³/tago, kaj tiel la duono de ĉiu kloakakvo foriĝos pere de komunumaj kanaloj.

Malpliigi la damaĝojn okazantajn pro la kreskanta akvopoluado restas konstanta problemo ankaŭ por la industrio kaj agri-



Malnova hungara baskulputo

kulturo. Dum la sana trinkakvo prezentas premajn zorgojn por evolulandoj, la poluiĝo de la surfacaj kaj subteraj akvoj estas problemo aktuala por la bone kaj meze evoluintaj landoj. En Eŭropo, same en Usono, la rapida kresko de la nitrata kaj fosfata enhavo de la akvoj iĝis centra problemo en la akvomastrumo.

Precipe minaca ŝajnas la malboniĝanta kvalito de la subteraj akvoj. La poluiĝon de riveroj kaj akvoj ĝenerale eblas ĉesigi forigante la kaŭzojn, kaj tiam pro la natura forfluo, la poluitan anstataŭos pura akvo. Sed la poluiĝo de subteraj akvoj restas daŭra, pro la malrapida akvoŝanĝiĝo ili ne refreŝiĝas. Se jam poluiĝis per nitrato la grundakvo, ĝi ne kapablas per si mem sennitratiĝi. Sed oni devas aldoni: krom la naturaj kaŭzoj ofte ankaŭ senrespondeco, puninda malplenumo, eĉ nescio kaŭzas gravajn damaĝojn.

En la industrio estas necese instali taŭgajn antaŭpurigejojn, enkonduki teknologiojn, kiuj bezonas malpli da akvo, kaj ripete utiligi la akvon; industrio kaj agrikulturo devas forte ŝpari akvon, kaj severe gardi la teknologian disciplinon kaj la regulojn pri akvokvalito. En malgrandaj vilaĝoj, kie la financoj ne ebligas disvolvi la kanalizadon, tamen eblas plibonigi la nunan staton per facile realigeblaj, simplaj kaj malkaraj purigiloj, foje pere de fermitaj sedimentigejoj. Oni pli kaj pli okupiĝas pri kampara kaj arbara utiligo de la kloakaj akvoj kaj ŝlimoj, ankaŭ per ties sendamaĝa deponado.

La ŝtata investado en Hungarlando por kanalizado kaj purigo de kloakakvo sumas 20 miliardojn da forintoj (570 milionojn da dolaroj) en la nuna kvinjaro, t.e. 35 procentoj de la tuta hidrologia investado. La celo estas, ke malpliiĝu la ritmo de la akvokvalita malboniĝo, eĉ en kelkaj gravaj regionoj – precipe ĉe Balatono – ĝi laŭgrade pliboniĝu.

La akvo estas tia natura aĵo, kiu nur tiam estas trezoro, kiam

oni prudente mastrumas ĝin; se oni ĝin neglektas, senpripense poluas, malŝparas, ĝi transformiĝas kaŭzanto de tre gravaj damaĝoj. Sekve oni devas ĉie aprobi la deklaron de UN: la akvo – simile al la sunlumo kaj aero – estas premiso de la tera vivo, al kiu ĉiu vivulo havas naturan rajton. Oni devas krei tian socian medion, ke ĉiu sentu sian respondecon gardi por la venontaj generacioj nian akvotrezoron, eĉ pli pura ol nun.

Tiun taskon plenumi eblas nur per kunlaboro, precipe kun la landoj en la sama akvokolekta baseno. Por Hungario tiu kunlaboro estas des pli grava, ĉar nur kelkaj procentoj de la etaj naturaj fluoj devenas el nia lando: el ses landoj venas pli-malpli poluitaj akvoj en niajn riverojn! La internaciajn hidrologiajn kontaktojn de Hungario reguligas ĉefe la kunagado enkadre de Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo, la principoj kreitaj en fakaj organizoj de UN, kaj la duflankaj internaciaj konvencioj. Nia agado daŭre plenumiĝas en spirito de la Konvencio de Helsinki, per amika kunlaboro kun la socialismaj landoj, inter pli kaj pli favoraj cirkonstancoj.

Nuntempa fakulo havas la devon serĉi la manieron, kiel reguligi la rilaton inter la homo kaj la reala mondo. Kiel interveni en la naturon tiel, ke, kontentigante la ekonomiajn bezonojn, restu ebloj restarigi la naturon almenaŭ samvalora, por havigi al niaj idoj ekologie konvenan kaj valoran vivon.

Reguligo de la akvokvalito

La tasko de tiu reguligo estas teni inter difinitaj limoj la lokan akvokvaliton por ebligi diverscelajn utiligojn de la akvo laŭ la bezonataj kvalitoj. La modernaj principoj celas krei kompleksan reguladon por tutaj akvokolektaj basenoj. En tiuj sistemoj la intervenoj estas determinataj laŭ sciencaj kaj ekonomiaj esploroj. Tiamaniere apud iu rivero oni povas ekonomie kaj akordigante instali enfluejojn kaj purigejojn de kloakakvoj.

Oni devas konscii, ke la protektado kontraŭ poluado bezonas ĉe iu regiono – baseno – tutan serion da disponoj; tio komenciĝas jam ĉe la entreprenoj per la racia akvouzo kaj reakiro de materialoj el la poluakvo, per la konvena manipulado de la akvo, kaj inkluzivas la instalendajn purigejojn ĝis la sendamaĝa forigo, depono de la purigita akvo. Paralele oni devas ankaŭ pripensi, ĉu indas krei akvon kompletigajn instalaĵojn por la sistemo, aŭ provizoran rezervejon por la poluakvoj – tiuj ebligas enlasi la dume purigitajn akvojn en la fluejon en konvena tempo, kiam ĝi estas plej ŝarĝebla.

Dum la lastaj du jardekoj la

Moderna purigilo de poluakvo en la urbo Kazincbarcika





Ekzamenado de sondita akvo

Internaĵo de akvorezerva turo

reguligo de la akvokvalito evoluis saltmaniere, parte pro la kreskantaj bezonoj, parte helpe de praktike aplikitaj novaj sciencaj rezultoj kaj metodoj (ekz. sistemanalizo, aŭtomataj kvalitsondiloj, komputiloj, ktp.). La plenumo de la reguligo bezonas multflankajn agojn. El inter tiuj ni mencias nur tri:

1/ la registrado de la stato,
2/ la prognozo, kaj
3/ la preparo de decidoj.

La registrado de la stato inkluzivas la sisteman notadon kaj konsideradon de la fenomenoj koncerne la akvokvaliton kaj la enlason de poluakvoj (tiucele necesas projekti la reton de sondiloj, ties indikojn analizi en laboratorio, prilabori per tabeloj kaj diagramoj). *La prognozo* estas proksima aŭ malproksima. La proksima prognozo okupiĝas pri kvalitaj efikoj dum forfluo kaj miksiĝo de okaza poluakvo-ondo. Per malproksima prognozo estas analizataj la atendeblaj sekvoj de novaj aŭ modernigotaj kanaloj kaj purigejoj. *La preparo de decidoj* plenumas, surbaze de 1/ kaj 2/, la kalkuladon pri ŝarĝeblo, kvalito-bilanco, planas teorie la necesajn intervenojn, ties spezojn, elektas la vicon de la farendaĵoj, en la kadro de la regionaj planoj.

Jura reguligo pri la protektado de akvokvalito

La multajn malekvilibrigojn de la naturo fare de la homo oni devas restarigi ne nur per teknikaj kaj ekonomiaj rimedoj, sed ankaŭ per ŝtata povo, pere de instancoj kaj juraj reguloj. Mem la akvoprotektado baziĝas sur registara dekreto, eldonita antaŭ 20 jaroj, kiun sekvis pluraj juraj disponoj por igi la aferon pli efika kaj disvolvi la tiucelan organizon. Tiurilate montriĝis tre grava la leĝo en 1976 pri jura protekto de la tuta naturo, de la homa medio. Post pluraj laŭcelaj modifoj, nun rezultis la sekva jura situacio:

Ĉiu entrepreno (aŭ alia organo) kiu per poluado faras damaĝon rilate la akvon, devas pagi monan punon. La leĝo determinas la minimumajn gradojn de la damaĝo koncerne 18 poluajn kaj 13 venenajn materialojn, ankaŭ laŭ la protektindeco de la akvoj. Al la plej protektinda kategorio I apartenas la regiono de Balatono –, tie estas la jam punendaj minimumoj plej malaltaj, en la ceteraj kategorioj tiuj minimumoj iĝas pli kaj pli altaj.

La monpuno konsistas el baza sumo, diversaj modifaj faktoroj kaj progresiva multiplikanto. Pri la sumo decidas, kiel instanco, la hidrologia direktoro. La modifaj faktoroj esprimas la danĝeron por la mempuriga kapablo de la akvo, respektive la ekolo-

gian minacon. Pere de la progresiva multiplikanto eblas instigi la entreprenon por establi taŭgan purigilon aŭ alimaniere malpliigi la poluadon.

La celo de la monpuno ne estas la venĝo, sed forta instigo por ĉesigi la poluadon. Pro tio la juro ebligas diversajn favorojn al tiuj, kiuj komencis la establon de investaĵo por eviti la damaĝojn, kiujn kaŭzas la poluado.

Kiel instanco, la protektado de akvokvalito, t.e. ĝia organizo, preferas pli kaj pli la kunlaboron kaj la akordigon. Do la administrado ne nur kontrolas, registras kaj punas, sed prefere kune kun la interesitoj aktive serĉas la plej praktikan, plej taŭgan solvon, kaj siavice akcelas ties realigon. Sen tia kunordigo povas ofte okazi, ke la diversloke troviĝantaj figuroj ne konvene utiliĝos, sed akordo malpli efikos. La hidrologiaj organizoj devas ne atendi ĝis la puno, sed prefere kontroli, sondi, orienti, informiĝi kaj vaste konsideri la okazintaĵojn en siaj teritorioj.

*

Videblas verŝajne el la supre menciitaj, kiel multspecaj disponoj – teknikaj, juraj, ekonomiaj, organizaj – estas necesaj por protekti nian fundamentan trezoron, la akvon. Tamen ĉiuj disponoj kaj agoj iĝas nur tiam sukcesaj, se la socio aktive subtenas ilin. Ni ĉiuj, estante konsumantoj, havas intereson koncerne la protekton de la akvoj, sekve ni ĉiuj devas konscie kontribui al tio, ke ni mem, ankaŭ la postaj generacioj havu la eblon, puran kaj sanan akvon trinki kaj hejme, kaj en aliaj lokoj.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*



Purigilo de poluakvo

Populara kuracakvo el la montaro Bükk



Forigo de olea poluiĝo per tabula barilo

Infanvestoj el Hungario

Hungarajn geknabajn vestojn
por aĝo 2—12 jaroj eksportas:

HUNGAROCOOP
H—1370 Budapest 5.
P.O.B. 334

HUNGAROCOOP Kooperativa Entrepreno

por Eksterakomerco

Kalocsay-solenaĵoj en Budapeŝto

La 6-an de oktobro 1981 estis la 90-a datreveno de la naskiĝo de Kálmán Kalocsay, klasikulo vaste konata en Esperantio, kiel tradukisto, poeto, lingvisto.

En la sidejo de la Asocio de Verkistoj: P.A.Rados laŭtlegas la poemon de Kalocsay: „La celoj ĉie dronis». (Foto: Z. Fejér)

Pri tiu unika personeco rememoris en Budapeŝto liaj estimantoj ĉi-oktobre. La unua solenaĵo okazis en la sidejo de la Asocio de Hungaraj Verkistoj la 12-an de oktobro. La kunvenon ĉeestis Sándor Rákos, prezidanto de la Tradukista Sekcio de la Asocio, kaj Imre Makai, ĝia sekretario. La ĉeestintoj povis rigardi la ekspozicion de la verkoj far Kalocsay, aranĝitan de Károly Fajszi. (Vd. sur la kovrilpaĝo). Dum la evento okazis la unua prezento de la plej grava postmorta Kalocsay-verko, nome tiu de la du-voluma „Tutmonda Sonoro", far la redaktinto V. Benczik.

La 26-an de oktobro okazis memorfesto en la Budapeŝta Esperanto-klubo Konkordo, kies prezidanto, poste honora prezidanto estis Kálmán Kalocsay. Okazis prelegoj pri Kalocsay: kiel kuracisto, lingvonoviganto kaj movadulo, kaj pacbatalanto, krome estis prezentita ankaŭ ĉi tie „Tutmonda Sonoro".

P.A.R.

Rememore pri Hilda Dresen

Antaŭ unu jaro mortis Hilda Dresen, unu el la plej signifaj kreantoj de la Esperanta literaturo. Nia Redakcio fieras pri sia kontakto kun ŝi – fakte ŝi estis fidela leganto, kaj de tempo al tempo ankaŭ kunlaboranto de HV. Ĉi-sube ni publikigas ŝian emocie belan leteron al redakciano de nia revuo: verŝajne tiu ĉi letero estas entute unu el siaj lastaj korespondaĵoj.

„Estimata kaj kara s-ano E. Fenyvesi,
Feliĉan Novan Jaron!

Tallin, 16. XII. 1980.

Ni havas abundan neĝon kiel sur la karto, sed poste ekpluvis, la neĝo preskaŭ ĉie fordegelis. Sed nun ree venis frosto – eble ni havos „lumajn, helajn" festotagojn!

Tiu ĉi jaro estis tre morna, malĝojiga por mi kaj tial la malsanoj min atakis. Sed kial plendi? Mi esperas, kredas, ke nia movado ĉiurilate pli kaj pli maturiĝas.

Do ĉiam kun espero antaŭen – hieraŭ ja estis Zamenhof-tago...

En novembro mi skribis iom konfuzan leteron – do mi ankaŭ hodiaŭ preferas skribi ne oficialan leteron sed personan, hejmencan.

Mi skribis sufiĉe multe pri nia forpasinta poetino M. Under. Ŝi ne sukcesis ĝisvivi la 100-jariĝon – sed okazis alia unikaĵo. Ŝi estis petinta, ke oni enterigu ŝin apud la edzo kiu mortis antaŭ kelkaj jaroj en la sama malsanulejo, kien li transloĝiĝis por helpi, flegi ŝin. La edzo ne volis ke oni lin cindrigu – do ŝi petis ankaŭ ŝin ne cindrigi; sed tamen okazis pro fatala eraro, ke oni cindrigis ŝin anstataŭ iu alia mortintino. Do ŝi havis du sepultojn. La cindrigan sepulton partoprenis homoj al ŝi tute fremdaj. *Poste la enteriga kontrolisto malkovris la eraron. La episkopo konsilis fari duan sepultsolenaĵon en la Jakoba preĝejo kaj poste enterigi la urnon en la ĉerko. Tiel oni ankaŭ faris. La pastro malkaŝe klarigis la aferon (eraron). Estis ĉk. 400 personoj kaj bela solenaĵo. – Mi tamen ĝojus, se tio ne estus tiel okazinta, sed ŝi estus ĝisvivinta la 100-jariĝon!*

Mi nun unuavice en la nova jaro penos iom prilabori ŝiajn versaĵojn – eble oni eldonos en 1983. Mi havos ĉk. 150 tradukitajn versaĵojn – kelkaj tre longaj. Se mi tiam ne ĝisvivos – ja ne gravos. – Sed ĉiam oni poste trovas korektindaĵojn – ili ja estis tradukitaj en tre diversaj tempoj. Mi kvazaŭ ŝuldas al la memoro de la poetino fari la plejon, kiom mi kapablas. Ŝin tradukis ankaŭ K. Matuba en Japanio kaj M. Under tre fieris pri tio.

Estu sana, entreprenema – ĉiuj, ĉiuj tie en la „verda" Budapeŝto.

Kore salutas

Hilda Dresen"

Szilárd Bálint

Ĉiutaga historio

Andreo konatiĝis kun Eva dum Silvestra balo. Eva estis blonda kaj gaja, Andreo estis bruna kaj serioza. Oni diras, ke la kontrastoj altiras unu la alian, tiamaniere ilia geedziĝo okazis sekve de granda amo. La viro estis direktoro de granda fabriko, kies multaj filioj ekzistis en diversaj lokoj de la lando. Post la geedziĝo la viro malcedis labori la edzinon, dirante, ke li havas altan salajron, tial ne estas bezonata ŝia ĉiutaga laboro en kontoro, la edzino faru nur la hejman laboron.

Eva obeis, sed enuis, mankis por ŝi la societo de gekolegoj. Ŝi ĉiam sopiris denove labori, sed la edzo restis nefleksebla, laŭ Eva pro vira egoismo kaj pro ĵaluzo. Dumtempe naskiĝis filo, kiun ili ambaŭ tre amis. La malgranda Zoli, kiu komence donis multajn okupojn al Eva, reportis la familian harmonion. Dumtempe Andreo en ĉiuj du-tri semajnoj vizitis kaj kontrolis la provincajn uzinojn, kaj tiam dum kelkaj tagoj li restis for. Ofte okazis, ke sur la vesto de Andreo la edzino flaris malpropran parfumaĵon, sed ŝi ne atribuis grandan signifon al tiu afero, ĉar la edzo ĉiam estis ege afabla kaj bona familia patro kiam li alvenis hejmen.

Pasis la jaroj, Zoli jam vizitis infanvartejon, tial Eva tute ne sciis kion fari dum la multa libertempo. Antaŭtagmeze ŝi purigis la loĝejon, kuiris, lavis la potojn, kaj poste ŝi komencis enui, ĉar ŝia tuta posttagmezo estis libera. Por pasigi la tempon, Eva vizitis kinejon, poste naĝejon, kie la viroj kun grandaj okuloj admiris la belajn formojn de ŝia korpo. Kelkaj viroj alparolis ŝin, sed Eva malakceptis ilin. Fine ŝi akceptis la amikecon de juna, belstatura viro, kaj post unu monato ŝi vizitis lian loĝejon. Dum amorado li demandis:

– Ĉu via edzo nenion ekscios?

– Estu trankvila... Kiam li hejmenvenos, mi jam atendos lin en la ĝardeno antaŭ nia domo.

Tiu amrilato daŭris dum sufiĉe longa tempo, eĉ kiam Zoli jam vizitis la bazan lernejon. Venis la someraj ferioj, kaj la geedza paro forportis la filon al la avino, kiu loĝis en vilaĝo. Ŝajnis do, ke ili vivas en bela harmonio. Eva estis tre afabla al la edzo, al kiu ŝi prezentis liajn plej ŝatatajn manĝaĵojn. Andreo ofte alportis florojn, eĉ la geedzoj kune iris al teatro kaj poste vespermanĝis en eleganta restoracio aŭskultante muzikon. Kiam la edzo restadis en provinco, Eva ofte dum la tuta nokto ĝuis la amoron ĉe la juna viro.

Foje Andreo diris al Eva:

– Mi devos forveturi al Anglio kaj resti tie unu semajnon por trakti pri nova kontrakto kun iu firmao. Ĉu vi ne enuos?

– Tute ne... mi legos kaj ripozos...

Eva kaj ŝia amanto decidis kune ekskursi al la lago Balatono. La viro pruntepreni ruldomon al sia aŭto, do tiel eblis veturi kaj dormi agrable.

Estis jam vespero kiam ili alvenis en la kampadejon. Ili ricevis lokon apud ligna dometo, de kiu montriĝis lumo tra la kurteno. Nia paro iris vespermanĝi, kaj kiam ili revenis, la lumo en la ligna dometo estis jam estingita. Sed matene en la sama momento eliris du amparoj en bankostumo: Andreo kun bela junulino kaj Eva kun la juna viro...

Post la eksedziĝa proceso la filo restis ĉe Eva, la eksedzo pagis por ŝi alimenton. Ŝi forlasis la ĝardenhavan vilaon kaj el la dividita havaĵo aĉetis loĝejon en pluretaĝa domo. Ŝi denove komencis labori, la „fidela" amanto forlasis ŝin. Zoli sen la patra prizorgo iĝis miskonduta knabo, kiu ne volis lerni, nur interbatali kun aliaj infanoj en la parko antaŭ la domego.

Iun tagon Zoli kuradis en la parko, terenfalis, kaj forte ekploris. Sur la genuoj estiĝis grandaj vundoj, sur la kruroj fluetis sango. Abrupte aŭto haltis ĉe la vojrando, kaj kun medicina saketo en la mano mezaĝa virino kuris al la knabo. Sur la benko Zoli ĉesis plori, kaj kun granda miro rigardis la virinon, kiu per lertaj movoj purigis kaj bandaĝis la vundojn. La afabla virino demandis de la knabo:

– Ĉu vi scias vian tutan nomon?

– Jes... mia nomo estas Zoli Varga.

Post tiu kuracista helpo la virino – la distrikta doktorino –, kiu bone konis la patron de Zoli, en aŭto rekte portis la knabon al la loĝejo de Andreo. La filo ĉirkaŭprenis la kolon de la patro, kaj kun laŭta ploro balbutis:

– Kara patreto... reportu tien ĉi la patrinon... kaj ni vivu kun... en paco...

Dume la hejmenveninta Eva kun granda angoro serĉis la filon. Kiam la ludantaj infanoj diris al ŝi, ke iu virino forportis lin per aŭto, Eva tuj kuris al la policejo por fari anoncon.

* * * *

Kara Leganto! Mankas la fino de tiu novelo, tial la redakcio petas vian helpon. Kian solvon trovis la eksa paro aŭ vi? Bonvolu sendi ne pli ol 30 tajpitajn liniojn. La plej bona solvo estos premiita kaj la teksto aperos en HV. Limdato: du monatoj post la alveno de tiu ĉi numero.

DAŬRIGO

de la novelo „La kaptilo",

aperinta en la n-ro 1980/3. Alsendis ĝin Elizarov Aleksandro, kiu ricevis la libropremion.

Antaŭ la kriminalisto Róbert Nagy sidis la suspektata viro István Csorba. En tirkesto de lia skribtablo kuŝis tiu ĉi famega „krimdokumento", la rozkolora silka mamzono, kiu nekompreneble estis en la poŝo de la akuzato. S-ro Nagy havis bonan homkonon, tial li post duonhora priaŭskulto firme konvinkiĝis pri lia senkulpeco, sed mankis la pruvo.

Poste antaŭ s-ro Nagy sidis la suferintino kaj ŝi brile afektis, ploris, sed samtempe ŝi senhonte kalumniis la telefoniston, priskribante tiklajn detalojn de sia violento. S-ro Nagy iom lasis ŝin plori, poste demandis:

– Sinjorino, ĉu via infano dum tiu ĉi sceno estis hejme?

Ŝi kapjesis kaj aktore ploris plu.

– Do, sinjorino, en intereso de la afero ni devas fari medicinan eksperton, ĉar viaj akuzoj estas tro seriozaj kaj ni devas ĉion kontroli!

– Mi protestas! ! – kriadis la virino dum kiam la policano kondukis ŝin en la kabineton de juĝeksperto.

Sekvis s-ro Lovász, edzo de Amalia, freneza pro la okazaĵo, simila je koleriĝinta Otelo. Por li estis torturo denove rakonti la historion. Dume la infano senzorge ludis en fotelo per ŝnureto.

– Kiom da jaroj havas via filo... li certe povas kanti, ĉu ne? – demandis s-ro Nagy.

– Tri jarojn – respondis lia patro, ĝojante pro la ŝangita temo. – Kantu pri ŝafido!

Post la kanto s-ro Nagy donis al la infano bonbonon kaj demandis:

– Ĉu la nekonata oĉjo hieraŭ posttagmeze vizitis vian patrinon?

– Tute ne... mia panjo estis kolerema... poste ŝi mem trinkis el botelo kaj iĝis tre gaja... kaj proponis al mi ludi...

– Kiel ludi? – miris s-ro Nagy.

– Ŝi demetis sian veston... sidiĝis sur seĝon... kaj petis ŝin alligi per ŝnuro al la seĝo... mi alligis ŝin... poste ŝi multe ridis kaj ni kune kantis... mi kuris ĉirkaŭ la seĝo, kiel rabisto...

La esploristo rigardis s-ron Lovász, kiu sidis kun stulta mieno, sed poste ekkriis:

– Nekredeble! Mia filo certe diris, ke tiu fremda viro ligis ŝin al seĝo? !

– Mi ŝercis simple... – konfesis la etulo – panjo volis timigi vin kaj instruis min, kion mi diru... ke estu plena la ŝerco...

– Nu, por mi ĉio estas tute klara – diris s-ro Nagy –, espereble vi ankaŭ komprenas ĉion, s-ro Lovász?

– Vere... ŝi diris jam al mi, ke ŝi trovis pli bonan viron ol mi...

Dume alvenis la raporto de la ekspertizo; ĝi plene konfirmis la konvinkon pri la senkulpeco de István Csorba, kiu baldaŭ estis liberigita.

Pro la mensoga kalumnio s-ino Amalia Lovász estis severe punita, laŭ la justeco.

Mihály Ladányi

Desegnokonkurso

Infanetoj,
desegnu por mi
senblasfeman belan tagon,
kaj tiun belan onjon, venantan
ĝuste ĉi-direkten,
kaj desegnu griloplenan
lunan vesperon por la onjo,
kiu eksidas, kaj rigardadas,
kiel mi faras fajron en la korto –
Poste desegnu por ni
liton, kaj fine
donu ankaŭ al mi
paperfolion blanke malplenan.

Tradukis: János *Tóth*

ESPERANTAJ LIBROJ EL HUNGARIO

Prus: **La Faraono** Bildrakonto
44 p., 24 cm. Prezo: 4,80 gld.

Géza Gárdonyi: **Steloj de Eger**
Bildrakonto
64 p., 24 cm, Prezo: 6,- gld.

Gvidlibro por supera ekzameno
370 p., 19 cm. Prezo: 15,- gld.

Vilmos Benczik: **Libro de romanoj**
229 p., 19 cm, Prezo: 15,- gld.

F.V.Dorno: **La aventuroj de L.R.M. Stultulof la X-A**
Satiroj
Levu la manojn!
140 p., 19 cm. Prezo: 12,- gld.

I. Lejzerowicz: **El la „Verda Biblio"**
84 p., 19 cm. Ilustrita, Prezo: 8,10 gld.

Ferenc Molnár: **La knaboj de Paŭlostrato**
182 p., 19 cm. Prezo: 13,80 gld.

25 jaroj. Premiitaj verkoj de Belartaj Konkursoj inter 1951-1975.
208 p., 19 cm. Ilustrita.
Prezo: 13.80 gld.

Elek Benedek: **Hungaraj Fabeloj**
70 p., 20 cm. Ilustrita. Prezo: 10.20 gld.

Zsigmond Móricz: **Ĉiela birdo**
44 p., 20 cm. Prezo: 8,10 gld.

Zsigmond Móricz: **Malriĉaj homoj**
36 p., 24 cm. Prezo: 2,40 gld.

Sándor Szathmári: **Kain kaj Abel**
Novelkolekto.
288 p., 19 cm. Prezo: 16.50 gld.

GAJA PAĜO

Ĝisosta ŝuldulo

— Via malpacienco estas vere nekomprenebla! Tute ne eblas, ke mi forgesis mian ŝuldon. Mi repagos ĝin kun tiu milo, kiun mi nun petas de vi.

Denove amikinoj

— Nia geedzeco venis al krizo — plendas amikino.
— Ĉu vere, karulino? Kial?
— Imagu, mi rimarkis, ke mi kokras mian edzon.

Denove amikoj (pro egaleco!)

— Dum la dekjaro de mia edzeco mi pasigis kun ŝi neforgeseblan duonhoron.

Sur avenuo

— Rigardu tiun fiaŭtiston, kiel li zigzagas... Damnita stratorato!
— Ne incitiĝu, li kredas sin aŭtokrato.

MEMADORA BUROKRATO



MILDA AVERTO

Ĉu vi jam varbis novan abonanton por HV?

Kaj la avinjo?

Kuracisto esploras ŝin: — Kion vi sentas, se mi premas vin ĉi tie? Aŭ ĉi tie?
— Ho, mia dio, kara doktoro! Mia junaĝo venas en mian memoron...

Amikinoj inter si

— Mia fileto ege similas lian patron, karulino!
— Kial timi? En via familio neniu konas lin.

Amikoj inter si

— Imagu amiko, mia fileto ege similas min.
— Ne malĝoju! Gravas, ke li estu sana.

Kaj la similaj simioj?

— Hej, amiko ĉimpanzo! La homoj originas de ni, kion fari? Kaj ili kredas, ke *ni* estas fieraj pro tio...

Ĝentileco

— Ĉiu mallaŭdas vin pro via kruda malĝentileco!
— Surfaca opinio! Mi ĉiam lasas la virinojn eniri antaŭ mi ĉe la dentkuracisto.

Ankaŭ la bestoj havas rajtojn

Mortis la brilan felon havanta zibelino en la neĝplena arbaro. Ĝia animo kuris supren sur la falantaj neĝflokoj en la ĉielon, kaj haltis nur antaŭ Sankta Petro. Li demandas:
— Ĉu vi havas ian varman deziron?
— Jes — respondas la zibelin-animo. — Mi dezirus havi mantelon kudritan el la haŭto de iu riĉa sinjorino...

Ankaŭ horloĝoj diversas

La prezidanto de la loka grupo okaze de jubileo ricevis de la grupanoj (ĉu alude?) sablan horloĝon. Fiere, li montris ĝin al sia familio: — Vera svisa sablo estas en ĝi!

Ŝanco en ambulanco

— Aveto, aveto! Miraklon jam ne atendu, mi ne kapablas vin *rejunigi* — emfazis kuracisto.
— Sed kara doktoro, mi tion ne petis! Ebligu nur, ke mi *maljuniĝu* kiel eble plej longe...

Memkritiko

— Ĉe tiu ĉi paĝo bonvolu nepre ĉesi la legadon de mia romano — presigis sur la marĝenon sincera romanverkisto.

E.F.

recenzoj * recenzoj

Intenco nobla – rezulto febla

NOKTO-Poemaro. Poezia antologieto de POEMO-ESPERANTO, Japanujo, 1981. Formato: 12x18 cm, 45 paĝoj. Prezo ne indikita.

Laŭaspekte tre plaĉa, librośatantojn ĝojiga, bele ilustriata kajero; la intenco de la eldonisto laŭdindas. Temas pri poemaro, kiu enhavas 31 poemojn – originalajn kaj tradukajn – foje jam publikigitajn en la numeroj 2-9 de la periodaĵo „Nokto", kompilita far s-ino Kako Nobuko. Societo POEMO-ESPERANTO fondiĝis en la jaro 1978, ĝia celo estas „interŝanĝi internacie molan kaj varman koron per *verda* poezio." (Kursivo mia. MF.)

Tiucele oni eldonis la presitajn „Nokto"-kajerojn, kiel kvaronjaran periodaĵon, kies lastaj du n-roj (10a, 1981 vintro, kaj 11a, 1981 printempo) atingis nian redakcion samtempe kun la recenzata poemaro.

Fine de la antologieto legeblas moto: „Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas ĝin nomi tia." Tute klara kaj estiminda estas la intenco de la kolektinto Kako Nobuko, kiun tamen mi ne povas nomi redaktoro. Ŝi ja intencis (kaj ĉi-terene sukcesis) prezenti la internaciecon de la E-a poezio, sed krom tiu intenco rimarkeblas nenia redakta koncepto nek en la „Nokto"-kajeroj, nek en NOKTO-Poemaro. Sed ĉu la internacieco sola povas akceptigi kaj klarigi aperigon de diletantaj provaĵoj en sama volumo kun poeziaĵoj de Ueyama Masao kaj Zora Heide?

Anstataŭ antologio de proksimume samnivelaj poemoj ni ricevas subjektivan kaj hazardan kunaĵon internacian. La diferenco inter nivelo de la poemoj estas tiel granda, kiel distanco inter patrioj de en la volumo prezentitaj brazilano Elma do Nascimento – kaj japano Macuda Kacunori.

POEMO-ESPERANTO – laŭ deklaro – „ne rilatas al politiko, religio kaj ideo". Eble tiu intenco pri neŭtraleco kaŭzis, ke ankaŭ la temaro estas malvasta; senfortaj ampoemoj, entuziasmaj movadaj poeziaĵoj... hazarde nur troviĝas poemo dediĉita al infanoj, viktimoj de atombombo (Bustin Martin, Francio) en alia poemo aŭdiĝas voĉo de medioprotektanto (Wolfgang Göpel, GDR) kiuj tamen diras ion.

La enhavo de la poemaro tre postrestas al ĝia aspekto. La leganto nur povas bedaŭri, ke estas tiel. Pretendemaj poeziamantoj juste atendas daŭrigon, sed fare de kompetenta *redaktoro,* ke kompilanto de antologio estu ne nur kompilanto, sed redaktoro en la vera senco de vorto.

Márton *Fejes*

★★★

Utilega konsultilo

Marinko Gjivoje: Konsultlibro pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj. Eldono de la Aŭtoro, kunlabore kun Eldonejo Gabrielli. Zagreb, 1980. 56 p. 20 cm. Prezo: 12,- ned.gld. (Por Hungario: 120,- forintoj.)

Esperanto-movado dum sia preskaŭ jarcenta ekzisto kreis kaj kvante, kaj kvalite konsiderindan kulturon. Pro la karaktero de la movado, tiu kulturo kreiĝis en sferoj, kiuj rekte utiligas la lingvon, t.e. en beletro kaj literaturo ĝenerale. Kaj ĉar konkreta manifestiĝo de beletro kaj literaturo estas libroj kaj revuoj, fakte la palpebla parto de nia kulturo konserviĝas en libraroj.

Ĉiu nacio atente zorgas pri la konserviĝo de libroj en sia lingvo, kaj certigas tion per grandaj subvencioj al bibliotekoj, kaj eĉ per leĝaj preskriboj pri senpaga liverado de ĉiuj libroj al la ĉefaj bibliotekoj. Tiaj garantioj por la Esperantaj libraroj ne ekzistas – ili ŝuldas sian ekziston al persistemo kaj ama zorgado de fervojaj unuopuloj, laborantaj dise en la mondo, kaj plimalpli sendepende unu de la alia. Tiu cirkonstanco kaŭzas, ke la lastatempe ekviglĝinta esperantologiaj esplorlaboroj luktis kun manko de gravaj fontverkoj, kvankam la koncernaj verkoj troviĝis en unu aŭ alia biblioteko, sed entute mankis informoj pri tiaj bibliotekoj. La verko de Gjivoje surprenas la taskon helpi almenaŭ en tio: li donas sufiĉe detalajn informojn pri naŭ publikaj bibliotekoj kun gravaj kolektoj de Esperantaj libroj, pri dek unu bibliotekoj de esperantistaj organizaĵoj kaj dek privataj kolektoj. Estis konsideritaj nur libraroj, kiuj havis minimume po 1000 volumojn. Kompreneble, li ne povas doni al ni katalogon de tiuj bibliotekoj, sed surbaze de la ricevitaj informoj oni tamen havas la eblon kontakti tiujn bibliotekojn: Gjivoje do kvazaŭ enkondukas la prezentitajn bibliotekojn en la vivigan sangcirkuladon de la Esperanta kulturo. Lia laboro kolekti tiun aron de informoj certe estis malfacilega, sed la rezulto valoris la penadon – li meritas nian sinceran dankon pro la klopodoj. Libroj certigas konserviĝon de verkoj de talentuloj, bibliotekoj certigas konserviĝon de la libroj – kaj la libro de Gjivoje (espereble!) almenaŭ kontribuos al la konserviĝo de tiuj bibliotekoj. Legindaj estas la enkondukaj ĉapitroj pri taskoj de bibliotekoj, pri Esperantaj bibliografioj, kaj pri la historio de Esperantaj bibliotekoj, kiel ankaŭ la informoj pri Esperanto-muzeoj. Serioza interesiĝanto pri la Esperanta kulturo ne povas malhavi tiun ĉi libron.

V. *Benczik*



Poemi – koncizigi

Albert Goodheir: Merlo sur Menhiro. Dua eldono kun novaj poemoj, kun ilustraĵoj. Eld. Kardo, Glasgow, 1979. Formato: 21x15 cm. Sen paĝnumeroj. Prezo ne indikita.

Unue mi trafoliumis la libron, kaj ĝoje konstatis, ke la plimulto de la poemoj estas mallonga. Kompreneble la poemojn, ilian valoron oni ne mezuras per ulno, centimetro. Tamen: koncize paroli, verki estas pli malfacile, ol longe. En nia atomepoko, kiam ĉiuj rapidas, kuregas, multaj homoj ne havas tempon kaj emon legi tre longajn verkojn. La pensa, koncíza liriko havas prioritaton ĉe legantoj. La „unuminutaj" noveloj de István Örkény estas ekzemple tre ŝatataj. Iu ironie diris: kiu longe parolas, verkas, tiu estas suspektinda. Lajos Áprily skribis: „Ho, savu min de homoj multparolaj, / de libroj vortinundaj, senmedolaj." Ekzemple en la germana *dichten* (diĥten) signifas: densigi, koncentri, koncizigi, – poemi. Sed ĝeneraligi ne licas. Poemoj de A. Goodheir estas ne pro tio belaj, bonaj, ĉar ili mallongas, sed eble pro tio estas kurtaj, ĉar ili estas kernhavaj. La poeto havas direndon, kiun li majstre prezentas. Moderna poeto estas li, kaj ne tiuj, kiuj ĉion skribas per minusklo, ne uzas interpunkcion, la vortojn de la versoj disĵetas. La internaĵo plie gravas, ol la eksteraĵo. „Ne varo; vero. / Estado; ne estrado. / Ne forn'; fajrero." Ĉi tio eble povus esti lia ars poetica (arto poezia).

La temo-sfero de la aŭtoro estas vasta. Pri la granda franca skulptisto Rodin iu diris: se li antaŭ la piedojn rigardas, jam li trovas cent temojn. Goodheir simile. Li trafe elektis – kiel moton – el Kalevala la jenajn versojn: ... „pluv' konsilis min pri kantoj, / malvarmeg' poemojn portis, / ventoj alŝvebigis vortojn, / maraj ondoj rulis ritmojn, / birdoj vindis belajn versojn, / arbaj suproj zumis frazojn." Kelke da inspiraj terenoj: forpaso – eterno, filozofio, satiro, amo – amoro, pejzaĝoj (Skotlando), homoj, socio ktp. La sentoj, pensoj, intuicio estas originalaj; klara, senbalasta, simple-grandioza esprimmaniero, subtileco karakterizas la poemojn. La humuro: plezuro, sed la ironio: pilorio, satiro: rapiro. Li ne enfermiĝas en ebura turo, vidas la problemojn de nia epoko, kunsentas kun la mizeruloj, suferantoj, subprematoj, estas kontraŭ la milito, teroro, ĉiuspecaj ostiĝintaj dogmoj, farizeismo. Jen: „En Belfast sur pavimo / en flako de sango / kuŝas knabino. / Eble ŝi travivos / sen kruroj. / Sur muroj vokas sloganoj: / „Libero." / „Al infero la Papon." / „Dio estas amo."

Liaj „liberaj" poemoj estas medolaj, ne ŝablonaj. Sed li estas ankaŭ formvirtuozo, verkas bonegajn robajojn – Khajjam-maniere, vortludajn hajkojn simile al la Japanoj. Paul Valéry diris: bona poemo ne estas finita, nur interrompita. Vere, liajn poemojn la leganto konservas, kaj plue pripensas ilin en la koro. Goodheir uzas multajn (malofte strangajn) vortkunmetojn. Ili estas necesaj por poetoj pro la multsilabeco de Esperanto, sed la modero, ora meza vojo estas konsilinda.

Talente verkita antaŭparolo de Marjorie Boulton, kaj la tutpaĝaj ilustraĵoj de Ruth Goodheir estas laŭdindaj.

Pro manko de paĝnumeroj la orientiĝo en la libro estas malfacila. Multaj supersignoj estis „ŝparitaj".

Resume: inspirata poeto, bela libro, riĉiganta enhavo.

Julio *Varga*

★★★

Mistero de krabaj pinĉiloj

Hergé: La krabo kun oraj pinĉiloj. (El la serio „La aventuroj de Tinĉjo"). Traduko de Herve Gonin. Eldonis: Casterman (Belgujo). Disvendas: Esperantix. Libre-Reponse 8538-755. F-75442 Paris-Cedex 15. ISBN 2-203-01001-0. 60 p. 30 cm. Plurkolore ilustrita, bindita. Prezo: 26,- francaj frankoj

Post „Asteriks" ni havas alian bildhistorion – aŭ komikson –, se vi volas kaj grafike tre belan libron, ĉifoje kun moderna temo. La lerta Tinĉjo kun sia hundo Miluo sukcesas solvi la misteron de la krabokonservaĵoj, pri kio ne sukcesis la du profesiaj, kaj laŭprofesie stultaj, detektivoj. La historio estas amuze intereskapta, la traduko flua kaj spicita per ofendcelaj esprimoj, kiel „volapukisto! " (brave!), „aztekoj! " (kial do ne „francoj" aŭ „belgoj"?), ktp. Se jam paroli pri nomoj de popoloj, ni notu, ke anstataŭ „Berabero" devus stari (laŭ PIV) „Berbero".

La ĉ. 800 plurkoloraj desegnaĵoj estas vere spritaj, tamen harmoniaj kaj evidente kompreneblaj, mi nur preferus vidi iom pli viglajn kolorojn, kvankam mi ne kuraĝus aserti, ke la uzitaj koloroj estas palaj.

Sendube, ĉiuj aĉetontoj de „La krabo kun oraj pinĉiloj" riĉigos per tre bela kaj tre amuza libro kontraŭ modesta prezo.

V.*Benczik*

Firma sereno

Ho Chi Minh: Versaĵoj kaj prozo. Tradukis Dao Anh Kha (poemoj), Nguyen Minh Kinh kaj Dang Dinh Dam (prozo). Eldonis: Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1980. 130 p. 18 cm. Prezo por Hungario: 25,- forintoj.

La imagon de la mondo pri Ho Chi Minh kompreneble formis ne lia poezio, sed lia dumviva luktado por la libero de sia lando. La plej multaj homoj tute ne scias, ke la Nord-Vjetnamia ŝtatestro – bedaŭrinde, li ne povis ĝisvivi la liberiĝon de la Sudo – estis ankaŭ poeto, eĉ, tre bona poeto.

Kompreneble, la tuta poezio de Onklo Ho kunplektiĝas kun la luktoj, tamen oni ne kredu, ke la poemoj estas nuraj versigoj de sloganoj, de politika starpunkto. Male: la poeto kaptas la realon ĝuste per la plej simplaj kaj ĉiutagaj aferoj, kiel la dilemo pri la utiligo de la akvoporcio: ĉu por teo aŭ sinlavado? El la plej multaj poemoj radias milda, sed firma sereno, kiun – eĉ inter ĉiaj suferoj – nutras la konvinkiteco pri la pravo de siaj starpunkto kaj agado.

La poemoj – krom kelkaj esceptoj – kreiĝis inter 1941 kaj 1949: granda parto el ili en prizono. Tiuj poemoj jam aperis kaj rikoltis sukceson en Esperantujo antaŭ kelkaj jaroj, sub titolo „Tagkajero en prizono". La simpleco, natureco de la tradukoj de Dao Anh Kha verŝajne sukcesas konservi tre multe el la ĉarmoj de la originalo: liaj Esperantaj versoj vere ravas.

En la volumo aperas ankaŭ ĉ. kvindek paĝoj da prozo. Inter ili troviĝas ankaŭ beletraĵoj, tamen la plej gravaj estas tri dokumentoj: „La proceso pri la franca koloniado" (fragmentoj), „Deklaracio pri sendependeco de VDR", kaj la kortuŝa „Testamento" de Ho Chi Minh, verkita printempe de 1969. Kun varma sincero rekomendante tiun ĉi libron al ĉiuj amantoj de bona poezio, mi volas danki ankaŭ la Eldonejon, kiu ĉi-okaze laŭdinde ne forkaŝis la nomon de la tradukintoj.

V. *Benczik*

★★★

Libro potence terura

Vojaĝo al Faremido / Kapilario (1916, 1921), Frigyes Karinthy (1887-1938). El la hungara trad. Lajos Tárkony kaj Andreo Szabó. Budapest, Hungara Esperanto-Asocio, 1980. 182 p. 18 cm. ISBN 963 571 045 3.

Oj, Gulivero! La senkompata Jonatano Swift jam devigis vin kvarfoje riski la haŭton per plej ekzotikaj vojaĝoj, kaj kvazaŭ tio ne sufiĉus, aliaj verkistoj vin pelas en eĉ pli kuriozajn angulojn de la terglobo. Du el la plej talentaj transdonantoj de guliveraj aventuroj estas hungaroj. Plej konata al esperantistoj estas la dua, Sándor Szathmári, kies „Vojaĝo al Kazohinio" (1958) estas inter niaj plej fierindaj originalaĵoj. Sed Szathmári donis al ni la sepan en la serio de vojaĝoj – ĉar pri la kvina kaj sesa jam zorgis lia samlandano Karinthy.

En Faremido, Gulivero renkontas la perfekte raciajn solasiojn, maŝinajn estaĵojn, kiuj parolas per muziko. Malgraŭ kelkaj interesaj ideoj (ekz. la homo kiel parazito de maŝinoj), la tuto impresas iom pale kompare al la simile raciaj hinoj de Szathmári.

La vizito al Kapilario estas ĉio krom pala: groteska, ofenda, naŭza... kaj ege leginda. Temas pri la rilatoj inter la seksoj en socio, kies viroj fariĝis nuraj „objektoj" por la inoj – kaj objektoj ne de amoro, sed de...

Nu, legu mem, se vi kuraĝas! El la nebulpensa enkonduka epistolo al H.G. Wells venas impreso, ke Karinthy efektive embarasiĝis pri la pensoj, kiujn lia verko malkaŝas. La satiro fariĝis, evidente, pli forta, ol li intencis – por transformiĝi al koŝmaro. Ĉu la verko vere spegulas la sociajn rilatojn inter viroj kaj virinoj, ĉu pli ĝuste ĝi spegulas virajn pensojn – ofte subkonsciajn – pri tiuj rilatoj„Kapilario" ĉiukaze estas rakonto terure potenca, kaj potence terura.

Karl *Pov*

Instruaĵoj kun garnaĵoj

Krilov: 111 fabloj. Trad: S. Rublov. 18 cm, 133 paĝoj. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1979 (1981). Prezo: 12,- ned.gld.

Foje estis ie povra, nekonata homo, kiu ŝatis la fablojn, tiujn de Ezopo, Fedro, La Fontaine, Grimm-fratoj, Andersen, András Fáy k.a. Vagadinte foje en Oldeclando, li renkontis Grandulon, nomatan Krilov, kiu donacis al li libron, kaj diris: ĉi-tiu libro gvidos, gardos vin sur la komplikaj padoj de la vivo, se vi legos ĝin kaj sekvos ĝiajn konsilojn, instruojn...

Sed ni ĉesu paroli fabelstile. La celo de la fablo estas: ridetante, bele, fabele diri la veron, instruaĵon. La moralo en si mem estas por multe da homoj teda, aŭ „ofenda". Amaran pilolon en oblato oni pli facile glutas, la rostaĵo pli bone gustas kun garnaĵoj. Jen, kelkaj tiaspecaj temoj el nia libro: labor-ŝato, envio, ambiciaĉo, fiero, fanfarono, senscio, maldankemo, malica ĝojo, flatado, mensogo, stulteco, prodigo, kverelo, konkordo...

La aŭtoro I.A. Krilov (1769-1844) estis bone konata rusa verkisto. El liaj fabloj kelkaj estas prenitaj el la verkoj de la grandaj antaŭuloj. (Ĉiukaze ĝis nun mi ne sciis, ke ankaŭ libelo scipovas *kanti*, – sed en fabeloj ĉio estas ebla.) Li estas sprita satiristo, kiu ĉiam prijuĝas malaplombojn, korupton, maljuston de sia epoko ironie, simple, nemiskompreneble. La tradukinto S. Rublov faris konsciencan, bonan laboron. Laŭdindaj estas la grafikaĵoj de László Kertész.

Estis bela gesto, ke Hungara Esperanto-Asocio intencis eldoni la libron okaze de la Internacia Jaro de la Infano, sed malpli belas, ke ĝi aperis nur du jarojn poste. Tamen, ĝi estas bonvena ankaŭ nun. 111 fabloj estas utila ne nur por infanoj, sed ankaŭ por plenkreskuloj; precipe por gepatroj, geavoj ĝi estas bona helpilo. Ili povas ĉerpi el ĝi, kiam la infanoj deziras aŭskulti fabelon. Ĉi tiuj fabloj ne nur amuzas, sed samtempe ankaŭ edukas. Kaj eduki estas ne facile, sed tre grave. Kaj la spritaj versoj de Krilov helpas en tio.

Julio *Varga*

LEHEL

PLI GRANDA
FRIDUJO

PLI GRANDA
KOMFORTO

Produktas:
HŰTŐGÉPGYÁR
JÁSZBERÉNY

Popola prudento

Denove *du proverbojn* ni citas en la ĉeflinioj (H.1., V.1.) de nia enigmo. Alsendi sufiĉas tiujn du proverbojn kaj ne pli! Limdato: unu monato post la alveno de la revuo. Inter solvantoj ni lotumos premiojn.

Horizontale: **13.** Plaĉa ido de raba mambesto **14.** Aerveturado (R) **15.** Kun V.6. ŝatata manĝaĵo **16.** Ankaŭ la korbaton karakterizas **17.** Moviĝi por atingi ion **18.** Movi ion al si (R) **19.** Ŝarĝveturilo **20.** Impeta movo **21.** Rikoltilo (R) **22.** ES **23.** Agrabla milda vento **25.** Malsaneca ĉelaro en organismo (R) **26.** Elbuŝigi enhavon de stomako (R) **28.** Fiksi per ŝnuro **29.** Populara trinkaĵo **30.** Pozitiva elektrod' **32.** Duoble: trinkaĵ' **33.** Lastvice **34.** Kap' senkomence **35.** Kiel H.18. **36.** Telegrafe informa **39.** Flosi pro la fluo deviante (R) **41.** Kuirvazon **42.** Ludej' en la cirko **34.** Eniras, ekz. per kaleŝo **45.** Filo, naskito **46.** N fonetike **47.** Osto en la brusto **48.** PA **50.** Muzulmana pastro (R) **52.** Literatura ĝenro **53.** Legomo el fam. liliacoj (R) **55.** Malbona antaŭsigno sen lasta silabo **56.** Hindian filozofian sistemon **58.** Timigu lin per fia intenco **60.** Sufikso **61.** Ilo por forigi malpuraĵon (R) **62.** Kapablo facile kaj laŭcele fari **63.** Franca filmaktoro kaj reĝisoro (Jacques) **65.** Reen: poseda pronomo **66.** Japana virnomo (de konataj aŭtoroj) **67.** Ekstrema parto de akso (R) **68.** Greka litero **69.** Komisiito por reprezenti la papon (R) **70.** Tia malorda spirita stato, kian kaŭzas febro aŭ ebrieco.



Vertikale: **2.** Geologian formacion de la sekundara epoko **3.** Duklapa manĝebla molusk' **4.** Arbo kun delikataj flavaj floroj, simbolo de sentemeco (R) **5.** Finaĵo, kiu el verbo faras substantivon **6.** Duoble: kortbirdo **7.** Febra malsano (el artikolo de d-ro László) (R) **8.** Patrino de patrino **9.** Itala mono **10.** Literoj de poseda pronomo, miksate **11.** Kiel H.60. **12.** Havigo al si **17.** Amerika krokodilo **18.** Pri kio oni diskutas **20.** Havi efektivan rezulton (R) **21.** Daŭre senti fizikan aŭ moralan ĝenon **24.** Prepozicio **25.** Populara danco, nerapida (R) **27.** Kio igas nin agi (R) **29.** Demandvorto **31.** Estas malsamaj **33.** Ponto subtenata de boatoj **34.** Ŝate iun **37.** Malgranda **38.** Delikata, agrabla odoro **40.** Urno senkomence **41.** Homa figureto, ludilo **44.** Responde al V.29. **49.** Genro de grandaj papagoj **51.** Ne profesia **52.** Virnomo (ekz. de ... Erwin Kisch) **53.** Mara rabisto **54.** Kvalit' **57.** Kantbirdo, similanta merlon (R) **58.** Sendita informo (R) **59.** Bonrezulte **62.** Maŝinelement' portanta akson aŭ privoton **64.** Sciigo, anonco, informo (R) **66.** Mia latine (... culpa) **67.** Voĉi pasere (R) **69.** LS **70.** Prepozicio

Solvo de la krucenigmo en n-ro 1981/3: Jakamoĉi, Leonidas, Vazov, Poe, Verlaine, Tennyson, Juvenalis, Simonides, Salomono, Hitomaro, Lermontov, Verhaeren, Moritake, Lao ce, Ady (ans. Y ni akceptis ankaŭ I.)

Libropremion gajnis: *Dieter Berndt,* Berlin, GDR; G.J. *Rodenhuis-Boll,* Aerdenhout, NL: *István Ertl,* Budapest H; La librojn ni jam sendis al la gajnintoj. – Kelkaj demandoj pro komposteraro mankis en la antaŭa numero. Petante pardonon de niaj legantoj, ni konstatas kun plezuro, ke la multaj solvantoj la mankojn bone supervenkis.

Ekzameno sen risko

111 fabloj de Krilov

Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio. 1979.

La originalaj fabloj de la talenta rusa verkisto Krilov estas mondkonataj. Krilov posedas freŝan humoron, proprecan stilon, belsonan lingvon, kaj tial la E-a traduko de liaj fabloj sendube riĉigas nian literaturon.

1. Per kio Damieno regalas sian najbaron?
2. Kiu fablo finiĝas per la versoj:
   „Sed pasu vi trankvile, en kviet':
   Post bojo eksilentos ili."
3. Bonvolu daŭrigi la frazon:
   „Ĝi ŝajnas bela en super',
   Sed verdas, – mankas..."

Limdato por la respondoj: du monatoj post alveno de la revuo.

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO • Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik. • Arta redaktoro: Judit Somhegyi. • Redakta komitato: Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits. • Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi. • Budapest, pk. 193. H–1368. Telefono: 141–078, 334–194. • Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. • Respondeca eldonisto: Tibor Vaskó. • Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtocifejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215–96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. • Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 78,-, al eksterlando por unu jaro 90,- forintoj. • Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest, P.O.B. 149, H–1389.) Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 7,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. • Presejo de Hungara Esperanto-Asocio, Budapest. Respondeca gvidanto: Tibor Vaskó.

Indexszám: 25 337 ISSN 0018–7704

Leterkesto

Cremer, Josef, FRG, *Bergheim/Glesch:* Okazas do ankaŭ ne malbonaj eraroj fare de la – ofte mallaŭdata – poŝta distribuo de HV. Vi solvis la „problemon" facile kaj elegante – niaflanke dankinde – se vi plusendis la ricevitan plus-ekzempleron al alia e-isto, kiun vi tiel interligis kun via ŝatata revuo. Viaj kritikaj rekonoj kontentigis nin (kompreneble nur momente) kaj ni intencas meriti similajn ankaŭ venonte. Koncerne la poŝton ni kune deziru prefere pliajn similajn malĝenajn gestojn de ĝi, ol vere ĝenajn mankojn.

Molnár Ágnes, H, *Sárospatak:* La varman kaj ĉarman saluton de la urba E-grupo la redakcio unuanime kaj kore dankas: kun granda kontento pro via E-agado en tiu alte kulturata urbo, kie ĵus jubileis la 450-jara (!) altlernejo – kaj kun esperplena plezuro, ke la tie edukataj venontaj instruistoj fidele enspiris la ideojn de la *tie instruinta* granda pedagogo *Komenius,* pioniro de la Internacia Lingvo.

Patera, Jiři, CS, *Prago:* Inter la taŭgaj rimarkoj pri nia enhavo estas aparte kontentiga via rekono pri la (jam finiĝinta) „Jarcentoj de la hungara literaturo", pri kiu antaŭe ni ne malmulte diskutis, ĉu publikigi la serion tiel, ĉu en alia varianto ktp. Se juĝi laŭ la alvenintaj eĥoj, la serio estis ankaŭ eksterlande konvene akceptita. Kompreneble tiu parto de la legantaro estis per ĝi alcelita, kiu interesiĝas pri trarigardoj de beletro.

Volk, L. FRG, *Würzburg:* Permesu gratuli, ke en tiel alta aĝo vi freŝe gardas vastan intereson pri la tutmonda movado! Ni klare scias dum redaktado, ke en revuo kun varia enhavo kiel la nia, diversaj legantoj, havantaj diversajn interesiĝojn, bezonas same diversajn rubrikojn, legaĵojn. Vi pravas: ne ĉio servas por ĉiu. Ke vi komencas legi nian revuon meze, ĉe la rubriko „Revuo de revuoj" (ankaŭ por retrovi tie aliajn gazetojn kiujn vi legas), signas certe spiritan viglecon, kaj laŭ nia scio tio ne estas escepta afero inter la legantoj. Daŭran sanon ni deziras!

Kurach, Petro, PL, *Garvolino:* La fakto, ke vi, juna studento, post unujara lernado jam konstante kaj plezure legas nian revuon, denove pruvas la rapidan (ne nepre facilan) lerneblecon de Eo. Konsentite, ke kvankam nia redakcia laboro radikas en la hungara tero, estas nature, ke ni okupiĝas pri kulturaj okazaĵoj en la mondo, niaj paĝoj estas malfermitaj por valoroj de ĉie ajn. (Tio ne signifas, ke ni ŝanĝus la titolon ekzemple je „Kultura – eĉ Literatura – mondo"...)

Stolberg, Oskar, GDR, *Brandis:* En via alparolo al artikolo de Baldur *Ragnarsson* (n-ro 1981/2) ni trovas rimarkinda la postulon daŭrigi la internaciajn ekzamenojn sendepende de la diverskaŭze malmultaj kandidatoj. Kulturmovado kiel Eo, bezonas, vi konstatas, science funditan mondkoncepton, sen tio eblas konfuzo... Logike. Kaj vere, tiu temo mankis en la artikolo. Sed... diskutado pri temo kiel mondkoncepto, neeviteble transportus la diskuton al alia tereno (kie miksiĝos jam aliaj vidpunktoj) kaj apudigus la originalan temon, la Esperantan kulturpolitikon. Vi certe konsentas pri la historia fakto, ke en la afero de IL foje distingeble, sed ne apartigeble jam *kuniĝis:* lingvo, movado, kulturo, internaciismo (por mencii nur grandajn sferojn), krome ĝi iĝis jam *tutmonda* afero. Tia kompleksa aspekto estas konsiderinda, laŭ nia modesta opinio. – Pri la kovrilbildoj de niaj numeroj ni danke kvitancas ankaŭ vian plačon.

Korespondi deziras

F-ino Carmen Clara *Camero* studentino pri plantokultivo, skoltismo, Venezuela, *Caracas* 1040, Vereda 60, No.11. Coche. – S-ro Eduardo José *Flores,* pri filatelio, remado, Venezuela, *Santa Monica* 1041/A, Aven. Lazo Marti, Polux A, apt. 1/c. – S-ro Roberto J. *Sánchez,* pri sportoj, Venezuela, *Caracas* 1090, Aven. Intercomunal del Valle, Resid. Radio 1. p.8. apt.8-6. – F-ino *Grigate* Jolanta (17) ktm, interŝ. bk, Vilainiu 53, *Kedainiai,* SU-Litovio 235-030. – D-ro István *Szabó* (42) juristo pri arto, historio, lingvoj, vojaĝoj, interŝ. bk, sonbendoj. *Eger* Zalka M.u.2. VII/50. H-3300. – Aleksej *Mohov* (27) oficisto pri klasika muziko, radiotekniko, interŝ. diskojn, respondos certe. *Kirov* ul. Truda 70-28, SU-610 020. – Karel *Hájek* ktm, pĉt, kolektas kolorbk, pm, E-aĵojn, ilustr. magazinojn, certe respondos. *České Budéjovice* Knéžkodvorská 13, CS-370 01. – Lernantoj de tekn. mezlernejo (17) pri junulara muziko, lingvoj, kutimoj, kol. prospektojn, emblemojn, Dariusz *Czarneczki, Smyków,* p-ta 52a, PL-26-212, Grzegorz *Korus, Laczna* Zaszosie 20, PL-26-040. – *Virág* Miklós studento (23) pri turismo, sporto, ekskursoj, muziko, lingvoj, *Subotica,* Ivana Milankoviča 29B, Jugoslavio, YU-24000. – Pentristo Stapanov Vlad. *Semonovič* (33) ktm, pri sporto, libroj, arto, diskoj, Krimeo, *Simferopol,* str. Mokrousova 12/9. SU-333 017. – Viktor K. *Jaroševič* (43) pĉt, *Brest* ul. Naganova 22, kv. 8. Belorusio, SU-224005. – F-ino Larisa *Kirŝ* (24) studentino de konservatorio pri muziko k.a., interŝ. diskojn, artlibrojn. *Ufa,* Aĵskaja 84-23. SU-450 078. – S-ro Rubén *Cardia C,* studento, pri futbalo, kino, Venezuela, *Caracas* 1080, Autopista Prados del Este, Calle Valle Alto, Resid. Isla Verde P.7. ap. 7B. – F-ino Brigitte *Clarac,* pri muziko, ekskursoj, *Caracas* 1011, Av. Mar. Sucre, Edif. Zenit, P.4. No. 4B, San Bernardino. – F-ino Meralis *Castrillo M,* pĉt, *Caracas* 1080, Urb. S-ta Inés, Av. Principal, Qta Yolissol. – S-ro Tonĉo Lozev *Tonĉo* fervojisto, *Plovdiv* str. Kardam 18, BG-4002. – S-ro Kazimierz *Dabrowski* (23) ktm, pri literaturo, lingvoj, turismo. *Wroclaw* ul. Koreanska 1/226, PL-52-121. – S-ro Jozefo *Rabi* (36) teknikisto, pri lingvoj, literaturo, vojaĝoj, *Székesfehérvár* Vörös Hadsereg útja 64. II/4. H-8000. – S-ino Erika *Beier* precipe kun hungaroj pri div., *Hall* in Tirol, Speckbacherstr. 5, A-6060. – S-ino *Varga* Anna (33) pĉt. *Hajdúszoboszló* Árpád u.27. H-4200. – Filateliajn temojn: sporto, flaŭro, faŭno kol. s-ro *Alosevičius* Arturas, *Mažeikiai,* Žemaitijos 9-22, Litovio, SU-235 500. – S-ino Helve *Suurmägi* (33) infanvartistino kun bona lingvoscio, deziras vastan korespondadon, nepre respondas. Estonio, SU-203006 Pirita sovh. Roosi 2-17. – *Jevdokimov* Aleksandro (36) sekr. de Kazahistana sekcio de ASE, filologo-germanisto, pri lingvoj, lingvistiko, kun seriozaj interesiĝantoj, interŝ. bk. SU-480072 *Alma Ata* Sejfullina 534-9. – S-ro Petro *Kurach* (16) Str. Stacyjna 55/18, PL-08-400 *Garvolino.*

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

BÁV

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.



BONAJO

30 marzo 1982

EL HUNGARIO